Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 18 — Trimonata

3/89

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: István Ertl

REDAKTA KOMITATO

Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ 36 1 180 966/185

Presado: Grafika Centro Antverpeno,
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

DAHLENBURG, T., La motivado de la instruisto 1
MEE, L., Niaj lernantoj bezonas propran vortaron! 7
NÚÑEZ, A.A., Pri la artikolo de Blázquez pri 'iĝ' 12
23a KONFERENCO: Nemulte sed agrable (kadra raporto) 16
23a KONFERENCO: Protokoloj de la ĝeneralaj kunsidoj 19
23a KONFERENCO: Raportoj pri la estraraj kunsidoj 22
ILEI en la Universala Kongreso (smg) 24
El la vivo de niaj sekcioj (Estonio, Belgio, Ĉinio) 29
Informoj (diversaj mallongaj eroj) 31

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout); tel. (03)666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Zsókavár ut. 46 IX 36, H-1157 Budapest; tel. (1) 560-244 (nur por lasi mesaĝon) — Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : Audrey Childs-Mee, Postbus 25041, NL-3001 HA Rotterdam; tel. (010)425.4625 — Rilatoj kun sekcioj, membroj kaj kun UEA. Internaciaj korespondaj kursoj. Pedagogia prizorgo de infanaj kongresetoj de UEA.

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

Membroj : Till Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Zang Danchen, Gong Wai Xi, Shifan Daxue, Wuhan, Huazhong, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

Jarkolekto 19 **jul.-sep. 1989** **N-ro 3, 1989**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas kvarfoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj, eĉ rekomendataj, kune kun fontindiko.

La motivado de la instruisto

d-ro Till DAHLENBURG

Kontribuo al la 23a ILEI-konferenco en Caerleon, 1989

"Mirego estas fundamento, sur kiu
konstrueblas eĉ piramidaro da scioj"
(Hermann Kant: La aŭlo)

La temo de nia konferenco "Motivado en la lerneja instruado de E-o" vekas multajn asociojn, ligitajn unuflanke kun la nocio "motivado", aliflanke kun la vorto "instruado".

Ĉu oni interpretu la gvidan temon tiel, ke la instruisto reprezentas la centran elradiejon por elvoki viglan intereson pri la studado de la fremda lingvo ĉe la disĉiploj, aŭ tiel, ke la instruanto mem devas esti sufiĉe motivita por efektivigi sukcesan instruadon de la fako?

Ambaŭ interpretadoj eblas, ili eĉ necesas, ĉar la du menciitaj procedoj — la procedo de la interes-elvokado kaj la procedo de la sinŝarĝado — kondiĉas unu la alian.

Kutime la ĉefa atento de la metodikistoj estas direktita al la unua procedo: utiligo de la jam ekzistanta motivado de la lernantoj aŭ "naskigo" de adekvataj motivoj ĉe ili flanke de la instruisto.

La persono de la instruanto estas agnoskata kiel centra rolulo en la lerniga surscenigo. "...la ĉefa motivado estas bona instruado, farata de kapabla instruisto en la klasĉambro. La infanoj (kaj en aliaj cirkonstancoj la plenaĝuloj) devas antaŭĝui la lecionojn de E-o" (PITT 1988).

Sed malpli da atento dediĉas la metodikistoj al la motoro de la lernoprocedo, t. e. al la internaj stimuloj, kiuj instigas la instruiston al krea aktivado, nelaciĝanta dum la tuta profesia vivo.

La historio de la E-instruado montras, ke la fazo de la ellernado de tiu fremda lingvo bezonas apartan metodikan subtenon kaj prilumadon, ĉar estas

postulataj de la instruanto originalaj ideoj por teni la instruadon kaj sekve ankaŭ la lernadon sur alta, fortostreĉa, pliriĉiga nivelo.

Pro tio, pure metodikaj artifikaĵoj perdas sian signifon en kursoj por progresintoj. Pli kaj pli okupas la unuan lokon temoj, kiuj koincidas kun ofte ankoraŭ sekretaj, ne malkovritaj streboj, eĉ sopiroj de la partoprenantoj.

"La pliriĉigo de la tuta personeco de lingvolernantoj...meritas eĉ pli da atento ol instruado de akuzativo, participoj, vortfarado k.s. ...Ni ebligu al niaj gelernantoj pli vastan horizonton ol infanoj kutime havas, por ke ili povu trovi la ĝustan lokon en la hierarkio de valoraĵoj en la mondo... Pere de Eo-instruado/lernado ni povas evoluigi ankaŭ aliajn gravajn karaktertrajtojn de personeco, nome eduki je persisto, je strečo de forto, je pretendemo al si mem" (BARCSAY 1989)

Nur sub la kondiĉo, ke la instruisto mem aspiras pri io supera, kio troviĝas ekster la limoj de ĉiutagaĵa parolkapabligo, estas garantiita la aparte alta eduka valoro de la lernado nome de la lingvo E-o, ĉar tiu instruisto intencas utiligi la gajnitan lernotempon kompare al la instruado de etnaj fremdaj lingvoj por vivigi en la animoj de siaj disĉiploj pli ŝatindajn motivojn.

Laŭ SZERDAHELYI 1976 "La motivoj determinas la agon, sed la motivojn determinas la celoj de la ago." Tio signifas, ke depende de la konkretaj celoj de la lernado estas ekfunkciigeblaj diversaj motivoj, aŭ ĝeneralaj kiel preparigo al estonta profesio, plenumado de socia devo, materiala intereso, aŭ rektaj motivoj kiel premio, puno, laŭdo, timo.

Simila aspektas la motivado de la instruisto: ankaŭ li submetiĝas al la interna stimularo, instiganta lin instrui en difinita kvalito. La esenca diferenco konsistas en tio, ke la instruisto konscie devigu sin alparoli kaj evoluigi en si mem tiujn motivojn de sia instrua laboro, kiuj certigas al li neestingiĝantan ardan emon al la profesia tasko.

Celoj de nia ago estas formulitaj en la STRATEGIA PLANO DE UEA:

2.2 instigi praktikan utiligon de la lingvo;
2.3 interesiĝo pri la lingva problemo kaj solvo de komunikaj problemoj;
2.4 engaĝiĝo en internaciajn organizaĵojn por faciligi ĉiujn kontaktojn inter la homoj en spirito de reciproka respekto;
2.5 kompreno kaj estimo inter la anoj de la diversaj popoloj, zorgo pri la propra kulturo, havi pli fortan ligon ol tiu ĝenerala celo faciligi la kontaktojn.

Al tiuj celoj konformas jenaj motivoj, per kiuj nia agado en instruado aŭ lernado emocie determinatas: komunikemo, asociiĝemo, profitemo, ekkonemo.

Kiel sciate, tiuj motivoj ekfunkciigitas en la dezirata direkto helpe de akompanaj stimuloj (= kvazaŭmotivoj), kiujn elradias la kursgvidanto, en kelkaj kazoj ankaŭ la lernolibroj:

– enplekto de sciindaĵoj pri la fremdaj popoloj kaj kulturoj en la traktendan lingvan materialon;
– fremdlingvigo, t. e. aktiva fremdlingva partoprenigo de la lernantoj en la instru- kaj lernoprocedo;
– konsciigo de la solvendaj lingvaj malfacilaĵoj, problemoj de ekkonado aŭ de alproprigendaj lernoperacioj;
– ilustrado de la lingvaĵo per kantado, bildoj, desegnoj, sonbendoj.

Resume: *la personeco de la instruisto difiniĝas per tio, kiomgrade kaj kiel li konsideras en la instruprocedo la individuajn trajtojn de la gelernantoj, kaj kiel li klopodas realigi tutgrupan kolektivan travivaĵon (lingvo ja nur vivas pro tio, ke ĝi estas bezonata por interindividuaj kontaktoj!).*

Sed ne ĉiu instruisto de fremdaj lingvoj komprenas, ke li mem apartenas al la grupo de lernantoj, ke ankaŭ li devas envolviĝi en la procedon de plulernado sur la terenoj de homgvidado, de lingvoscienco, de parolkapablo. Precipe minacas la instruiston danĝero de malstreĉiĝo de la mensa laboro, ĉar li ja ĉiam nur lernigas siajn lernantojn. Se la instruisto ne devigas sin mem konsekvence aktive partopreni la procedon de alproprigo de novaj faktoj, de neatenditaj interligoj, de nekutimaj ideoj, se li mem ne ĉiam denove fariĝas serĉanto sur faka kaj ĝeneral-kleriga terenoj, sed limiĝas je antaŭprogramitaj lernolibraj taskoj, tiam li perdas la ponton al unu el la ĉefaj motivoj de la lernantoj: scivolemo kaj ekkonemo.

Bonan ekzemplon de tia fruktodona influo sur la instruiston liveras la legolibro kun ekzercoj de MACGILL, "La laŭta vekhorloĝo". Ĉerpante el tiu libro instigojn por metodika kaj enhava fleksiĝemo, ni rimarkas kaj devas konstati, ke E-instruisto pli rapide ol instruisto de etna fremda lingvo metamorfoziĝas, transformiĝas al specialisto pri la koncerna lingvo en ide-produktanton, en reĝisoron de individua kaj grupa mensa aktiveco, en disponiganton de ĝeneral-klerigaj sciindaĵoj, en plej pretendeman aŭtodidakton. (Komparu la proponojn en la artikolserio de RADOS 1989 kaj la kontribuon al la 21-a ILEI-konferenco de DUCZMAL 1988.)

Tian pretendemon ĉe niaj E-instruistoj ni kiel ILEI-anoj devus evoluigi, kreskigi, direkti pli konscie, kunordigite, planite – per publikigado de ide-trezoroj (kolektaĵoj de materialo el la plej diversaj sferoj de la kultura vivo, taŭgaj por envicigo en la E-instruadon kaj respondantaj al tipaj interesoj de la E-instruistoj). El ili la instruistoj ĉerpu laŭ siaj preferataj sciokampoj forton por ĉiam pli altnivela instruado kaj por ĝojiga pliperfektiĝo. La instruisto ne rezignu pri sia individua motivado, sed envicigu ĝin en la ĝeneralan instrutaskon. Se li ne farus tion, li ne restus si mem!

Listo de supozataj interesoj kaj de "trezor"-proponoj

Literaturo:
- kolektaĵo de la titoloj de la mondfamaj literaturaj verkoj
- la titoloj de la plej vaste konataj fabeloj kaj fabloj

Geografio:
- la flagoj de la ŝtatoj kun klarigo de la simboleco
- la blazonoj de elektitaj ĉefurboj kun klarigo de la simboloj
- tipaj gestoj de diversaj popoloj (ekz. en nombrado, salutado, neado)
- proverboj en laŭvorta traduko kun klarigo en konsidero de la landa tradicio (kp. la lernolibron de BOIA 1979)
- praktikata geometrio, astronomio, algebro (laŭ la libroj de la sovetia aŭtoro PEREL'MAN, ekz. kiel mezuri la altecon de arbo, la larĝon de rivero?)

Lingvoscienco:
- etimologio de difinitaj E-vortoj sub konsidero de ilia aparteneco al komuna radiko
- la internaciaj vortradikoj en E-specifeco.

Ni supozu, ke profesian instruiston de iu etna lingvo, kiu turnas sin al instruado ankaŭ de E-o, logas unuavice lingvistikaj aspektoj. Li ja ne volas, ke la instruado de "sia" etna lingvo perdu sian signifon. Inverse, li volas, ke la studado de fremdaj lingvoj fariĝu pli serioza, pli profunda ankaŭ helpe de Eo. Pro tio li intencas ne nur lernigi al siaj studentoj E-on, sed samtempe konsciigi pri ĝeneralaj lingvaj fenomenoj. Tiu lingvistike orientita scivolemo (= motivo) ĉe granda nombro de E-instruistoj povus esti subtenata per kolektaĵo de fakaj informoj, ilustrantaj ĝeneralajn lingvajn fenomenojn. Ekzemploj:

1. Kontraŭdira aŭtonomeco de la lingvo rilate la envicigon de internaciismoj (forme kaj/aŭ enhave):

a, lat. *inspicere* germ. *inspizieren, Inspizient*
Esp. **inspici, *inspicisto*
lat. *inspectus* germ. **inspektieren, Inspektor, Inspekteur, Inspektion*
Esp. *inspekti, inspektoro, inspektisto*

Menciindas, ke ĉe tiu radiko Eo transprenis nur unu varianton, sed tendencas diferencigi la enhavon per diversaj sufiksoj ("inspektoro" en la senco de "Inspektor" havas sinonimon "inspektisto", sed en la senco "Inspizient" ne estas anstataŭigebla).

b, lat. *contrahere* germ. *kontrahieren, Kontrahent*
Esp. *kontrahi* (pp. muskolo), *kontrahiĝo, (kontrahanto)*,
lat. *contractus* germ. **kontraktieren, Kontrakt, Kontraktion, Kontraktur.*

Esp. *kontrakti, kontrakto, kontrakturo* (med.)

Atentu, ke la germana vorto "kontrahieren" uzatas rilate al muskolo, sed ankaŭ en komerca kaj sporta kampoj, la E-a "kontrahi" nur rilate al muskolo. Pro tio mankas en Eo *"kontrahanto"(kp. germ. *Kontrahent*), ĝi estas anstataŭata per "kontraŭulo". Okulfrapas, ke malgraŭ la ekzisto de la radiko "kontrah-" en Eo aplikatas ankaŭ la alia radikvarianto "kontrakt-" por signifi medicinan, muskolrilatan procedon (sed nur en la formo "kontrakturo").

Pri tiaj fenomenoj oni povas E-lingve diskuti dum la lernohoro, ĉar la faka vortaro interplektiĝas kun multaj vortoj, kiujn oni bezonas por la ĉiutaga uzo. (kp. BRAUN 1969)

2. Etimologio klarigas/malkovras neatenditajn koneksojn inter multaj eroj de la lingvo kaj de la mondo:

a, lat. *caper/capra* ("kapro/kaprino")
caprea ("kapreolino")
capreolus ("vir-kapreolo")
Esp. *kapro, kapriolo* (kaprica salto), *kaprico* (neantaŭvidebla volo), *kapriĉo* (kaprica komponaĵo), *kapreolo* (remaĉanta mamulo), *kabrioleto* (kp. angla *cab*) ("saltanta ĉaro"), *Kapreo* ("insulo de kaproj").

b, lat. *caput* (kapo), *capillus* (kapoharo)
Esp. *kapo, Kapitolo, kapitalo, kapitelo* (nur rilate arkitekturon), *ĉapitro, kapitulo* (eklezio), *kapitano, kapitulacii, kabo, bicepso, okcipito, okcipitalo, katastro* (origine: laŭkapa imposto), *kaporalo*.

c, lat. *trahere*
Esp. *trajno, trejni, trakti, portreto, subtrahi, abstrakti*.

3. Etimologio kiel helpo en klarigo de ŝajne malprudentaj E-vortoj

a, Esp. *laktuko*
popoletimologie el *lakto* aŭ *tuko*
sed science el latina *lactuca* (kp. germ. *Lattich*, angla *lettuce*)

b, Esp. *juglando*
popoletimologie el rusa *jug* ("*sudo*") kaj *lando*
sed vere el latina *Juglans* el *Iove-glans* ("glano de Jupitero")
Atentu! lat. *glans* =
kaj Esp. *glando* (organo, kies funkcio estas produkti sekrecion)
kaj *glano* (frukto de kverko)

c, Esp. *vertago* (raso de hundoj kun tre mallongaj kruroj: melhundo)
popoletimologie: el *vero* kaj *tago* aŭ *verto/vertebro* kaj *ago*
efektive el latina *vertragus/vertagus*, keltdevena vorto kun la signifo "feliĉo", t. e. hundo kun rapidaj kruroj.

En tiu rilato rekomendindas enrigardi KOLKER 1980, kie la aŭtoro vaste utiligas etimologiajn kunligojn kiel memorhelpilojn, ekz.

etendi kp. kun rusa *tendencija*
insulo kp. kun rusa *izolirovat'*
trajno kp. kun rusa *traktor*
senco kp. kun rusa *sensacija*

Evidentiĝas, ke per Eo-instruado oni povas plialtigi la ĝeneralan klerecon, se oni ne limigas sin en la instruado nur je "transdono" de la lingvaĵoj necesaj por la komunikado.

Nin vere kunligu pli forta bendo ol tiu ĝenerala celo faciligi la kontaktojn: ni zorgu en nia E-o-instruado ankaŭ pri kulture valoraj enhavoj de eblaj kontaktoj. La elirpunkto por enhava plialtigo de la E-instruado estas determinata per la personeco de la instruisto. Ni donu al niaj E-kursgvidantoj tian materialon, en kiu respeguliĝas kiel eble plej diversaj interesoj nome de la instruistoj, por ke ili ĉiam denove ekhavu motivadon konsideri resp. evoluigi la motivadon ĉe iliaj lernantoj.

Referencoj

BARCSAY Zsuzsa: Feliĉan Novan Jaron. Budapeŝta Informilo, 1989/1, p 1-2.
BOIA, Aurel: 11 X 11. Esperanto prin proverbe. Curs minimal. Uz intern. Bucuresti, 1979.
BRAUN, Walther: La grammaire française en dialogues. Dortmund, 1969.
DUCZMAL, Stanisław: Cent temoj por paroligi niajn lernantojn. El teorio kaj praktiko de Esperanto-instruado. 21-a Konferenco de ILEI en Lodzo. Łódź, 1988.
KOLKER, Boris G.: Metodiĉeskije razrabotki po meždunarodnom jaziku Esperanto dlja kursov. Ufa, 1980.
MACGILL, Stefan: La laŭta vekhorloĝo kaj aliaj atentokaptiloj. Budapest, 1988.
PEREL'MAN,J. I.: Zanjimatel'naja algebra. Moskva, 1959.
PEREL'MAN, J. I.: Zanjimatel'naja geometrija. Moskva, 1959.
PEREL'MAN, J. I.: Zanjimatel'naja astronomija. Moskva, 1961.
PITT, Arnold: Kial motivado? Internacia Pedagogia Revuo, 1988/3, p. 22-23.
RADOS, Péter A.: Kio okazas en Piratio? Budapeŝta informilo, 1989/3, p. 6-7.; 1989/4, p. 10-11.
SZERDAHELYI, István: Metodologio de lingvolernado kaj parolalproprigo. Budapest, 1976.
UEA: En la duan jarcenton: Strategia plano de Universala Esperanta-Asocio. "esperanto", 1988/10, p. 168-177.

Niaj lernantoj bezonas propran vortaron!

Lawrence MEE

Tute konata fenomeno

Se iam regis inter E-istoj la ideo, ke varbado de simplaj subtenantoj por la ideo de internacia lingvo plene sufiĉus por akceptigi tiun lingvon ĝenerale tra la mondo, tiu periodo estas jam delonge for. Esti subtenanto por la ideo implicas lerni kaj uzi la lingvon; pasiva subtenado en iu formo estas konvena, kompreneble, sed ĝi ne sufiĉas. Kiel konate en aliaj agadsferoj, la mondo pretos akcepti E-on nur kiam ĝi vidos pruvon, ke la lingvo estas regata kaj uzata de granda homamaso.

Inter la anoj de tia homamaso devus troviĝi reprezentantoj de kiel eble plej multaj lingvo-grupoj de la mondo; devos esti klare videble, ke por tiuj reprezentantoj Eo estas la komuna dua lingvo de komunikado trans la lingvo-limoj.

Tiuj konstatoj estas jam delonge agnoskitaj flanke de la gvidroluloj de nia movado; naturaj sekvoj estas la Universalaj Kongresoj kaj la multaj aliaj organizitaj renkontiĝoj, la internaciaj fakaj asocioj ktp. Natura sekvo estas la ekzisto de lernolibroj aranĝitaj por ĉiuj el la ĉefaj lingvoj de la mondo kaj por pluraj el la neĉefaj lingvoj. Lastatempa kontrolo sugestas, ke eblas lerni Esperanton per utiligo de pli ol tridek kvin lingvoj, krom la konataj rektmetodaj kursoj, pere de Eo mem.

Ne tiel konata fenomeno

Sen ia dubo, tiuj lernolibroj varias en kvalito, en efikeco, kiam uzataj ĉu dum instruado ĉu por aŭtodidakta lernado; tre verŝajne, la motivado de la lernantoj ankaŭ varias.

Sed eĉ kiam la kvalito de la instruado estas kontentige bona, kun lernantoj bone motivitaj por ekspluati la akiritan konon de la lingvo, restas ankoraŭ paŝo, al kiu ne sufiĉe da atento estas donita. Tio estas la malfacila paŝo, el ankoraŭa lernado en la kursoĉambra senco al plena regado de la lingvo, post akiro de la baza gramatiko kaj baza vortostoko, la paŝo transiri el dependeco sur vortaro E-etna lingvo al facila uzado de unu-lingva vortaro. Ju pli frue iu lernanto sentas fidon kompreni la signifon de vorto el difino aŭ klarigo en Eo, des pli frue tiu lernanto akiras la kapablecon vere pensi en la internacia lingvo; des pli frue tiu lernanto rolas kiel reprezentanto de nia lingva komunumo al la ekstera mondo.

Gajno por la lernanto mem estas akiro – post tiu malfacila paŝo – de pli flua stilo dum pensesprimado, pro la akirita facileco elpensi taŭgan kunmetaĵon, imiti la stilon de aliaj aŭtoroj, utiligi la uzekzemplojn donitajn kaj esplori indikitajn parencajn vortojn. Neniu el tiuj kromaĵoj estas donita per eĉ multjara kateniĝo al du-direkta vortaro. Alia gajno por la lernanto estas la konstatita ĝuo dum legado de tekstoj, pro forigo de iu tia sento de kateniĝo; konataj al la nuna aŭtoro estas pluraj E-istoj, kiuj ne plu provas legi tekstojn, pro manko de tia ĝuo.

Demando kun respondoj

Trafa demando estas: kiun unulingvan vortaron proponi al lernantoj, cele al kontentigo de tiuj bezonoj, al trapaso de tiu malfacila barilo?

Certe meritas konsideron, tiurilate, la Oportuna Vortaro de Ordinara Esperanto (la OVO-vortaro), 1969, de Vilho Setälä. Krom fideleco al la Fundamento de Esperanto, tiu verko estas tre opertune poŝformata kaj riĉe ilustrita, sed plene mankas en ĝi uzadekzemploj kaj indikoj de parencaj formoj.

Dum longe nun, la Plena Vortaro (kun Suplemento), estas la ĉefe proponita vortaro por tiu fazo, sed ankaŭ tiu verko havas malmeritojn, kiam ni kontrolas ĝin laŭ la bezonoj. Uzekzemploj abundas; indikoj al parencaj vortoj ankaŭ abundas en tiu vortaro. Sed por tiuj adeptoj, kiuj ankoraŭ akiradas lertecon en uzado de la lingvo, tiuj trajtoj troas. Krome, en tiu vortaro troviĝas tiom da fakteknikaj vortoj, ne-ofte renkontitaj en la ĉiutaga vivo, ke tiu nia nova adepto facile malesperas, fronte al tia grandega vortprovizo, ŝajne elfunde lernenda. (Des pli malmeritas konsideron, en tiu rilato, la Plena Ilustrita Vortaro!) Kaj unu alia trajto de PV, trajto, kiu malhelpas novan adepton, estas la troa uzado de majuskloj en tiu verko. Siatempe, ni agnosku, la uzado de majusklo por signi Oficialan vorton estis plene subteninda, ne malpleje pro tio, ke tiu verko estis kunmetita ne kun la celo doni helpon aparte al lernantoj.

Konkreta propono

Koncize prezentite, do: Esperantujo bezonas nove kunmetitan vortaron unulingvan, verkon, kiu estas samtempe manlibro de la lingvo por lernantoj kaj efika enkondukilo al pli altgrada studado de la lingvo por praktikantoj.

Propono kompili tian verkon estis prezentita al la 23a Konferenco de ILEI dum aŭgusto 1989 en Caerleon, Kimrujo, kaj post diskuto flanke de la estraro de ILEI, la propono estis akceptita. ILEI plue decidis doni oficialan aŭspicion al la rezulta verko.

La laborplano

Fona konstato pri tiu verko estas, ke necesas kunordigi interetnan teamon por la kompilado, kun du apartaj celoj.

Unuavice, la membroj de la teamo devas proponi por enmeti ĉiutagajn vortojn ne jam trovatajn en aŭ la OVO-vortaro aŭ en PV aŭ PIV.

La dua tasko estas kontroli la difinojn donitajn en la verko por la 'kapvortoj', cele al certigo, ke tiuj difinoj ja estas interetne kompreneblaj senambigue. Kaj simile, ke la uzadekzemploj donitaj taŭgas por la celo de la verko.

Flanka konstato, kiu ja estas influata per tiuj du taskoj, estas, ke necesas utiligi kiel eble plej modernajn metodojn por diskonigi felietone la disvolviĝon de la kompilado. Sen ia dubo, tio implicas la uzadon de komputoro. Per taŭga aranĝo de la 'ĉapitroj' de la verko sur memordiskoj, facile eblus elpresi en malneta formo tiujn ĉapitrojn, kaj konservi ilin por posta pli neta eldonado. Intertempe, facile eblus enkorpigi korektojn kaj ŝanĝojn.

Naskiĝis jam la Interetna Vortaro de Ordinara Esperanto

La bazan ideon de interetna vortaro bazita sur tiuj konceptoj unuavice konigis la nuna aŭtoro dum la aŭtuno de 1988, kaj en la daŭro de nur kelkaj semajnoj la laborplano pli-malpli fiksiĝis.

La baza vortprovizo de la vortaro estas la Baza Radikaro Oficiala (BRO) de la akademio de Esperanto.

Por ĉiu vorto aŭ elemento en la BRO estas donita difino aŭ klarigo, kun uzadekzemploj laŭeble reprezentataj de la ĉiutaga uzado. Figura uzado estas prialudata kiel eble plej ofte, ankaŭ kun uzekzemploj.

Ĉar ne estas senescepte kunmeti taŭgajn difinojn uzante *nur* la vortostokon de la BRO, necesis preni decidon aldoni vortojn ne prialuditajn en tiu BRO. La unua provo je decido estis enmeti ĉiujn Oficialajn vortojn de la lingvo, sed baldaŭ montriĝis, ke agi tiel tro ampleksigus la verkon, kaj krome riskus timigi lernantojn pro tia amplekso.

Sekve, la ĉefkompilinto, tute subjektive laŭ propra tasko, flankenmetas multajn Oficialajn vortojn, fidante, ke membroj de la interetna teamo atentigus lin pri iu troa elsarkado.

Takso farita post traktado nur de la a-vortoj sugestas, ke la fina grandeco de la verko estos proksimume ses mil vortoj kaj elementoj, donante vortoprovizon de minimume dek kvin mil vortoj, inkluzive de derivaĵoj ktp.

Akceptante la pravecon de la ideo klare indiki la formojn jam Oficialajn (ĉu aŭ ne ili troviĝas en la BRO), la ĉefkompilinto elpensis metodon malpli trudan ol tiu en Plena Vortaro. Samtempe, li adoptis analogan metodon indiki

proprajn nomojn jam oficialajn, kaj prenis la ŝancon prezentitan aldoni aliajn proprajn nomojn, ne oficialajn sed kongruajn kun oficialaj formoj. Ĉiu tia propra nomo aperas kun majusklo, sed krom pro tiu kaŭzo, la uzado de majuskloj estas rigore evitita. (Se, hazarde, tiu decido enterigos por ĉiam la diskuton pri ĉu la monato-nomoj aperu kun minusklo aŭ majusklo, des pli bone!)

Lige kun la ideo ne sklave referenci ĉiujn oficialajn vortojn, la verko enhavas, en la formo de apendico, liston de ĉiu vorto trovita en la PV sed ne enmetita en la IVOE. Per enmeto de tiu listo, la ĉefkompilinto esperas stimuli lernantojn al konsultado de pli imponaj vortaroj, je renkontiĝo kun iu faktekника vorto.

La nuna (septembro 1989) stato de la projekto

Por fari la proponon al la Estraro de ILEI dum la konferenco en Kimrujo, la ĉefkompilinto kunmetis unuan proveldonon de proksimume la unua duono de la a- vortoj, kaj disdonis plurajn ekzemplerojn de ĝi.

(Tiu proveldono enhavis, krom la 'kapvortoj' mem, listeton de la vortoj flankenmetitaj ĝis tiam, listojn de mallongigoj kaj signoj uzataj en la verko, kaj antaŭparolon.)

Surbaze de tiu proveldono, sep konferencanoj petis aliĝon al la reto de kunlaborantoj, promesante laŭeblajn konsilojn. La ĉefkompilinto promesis daŭrigi la kunmetadon ĝis la fino de la a- vortoj, kaj tiam raporti al la kunlaborantoj en iu formo de novaĵletero.

Kelkaj konferencanoj faris modestajn donacojn al la kaso de la projekto – tre bonvenaj! –, lasante al la ĉefkompilinto la taskon elpensi metodon akiri pli firman bazon, sed proponante petojn al fondaĵoj konataj pro edukaj kaj kulturaj agadoj.

La estraro de ILEI petis la verkadon de artikolo por IPR, kaj antaŭvidas aktivan kunlaboron en la projekto.

Glosaro

etno: homgrupo karakterizita per komuna trajto de lingvo aŭ origino, kaj prezentanta socian kaj fizikan koherecon.

interetna: montranta ion komunan al du aŭ pluraj etnoj.

komputoro: elektronika ekipaĵo, pli-malpli aŭtomate sinreganta post ekfunkciigo por aparta tasko, por plenumi ampleksan sinsekvon de aritmetikaj, logikaj kaj datenmanipuladaj operacioj, konforme al storita baza programo, sed en aparta sinsekvo diktita per la apartaj datenoj prezentataj, kaj kun periferiaj ekipaĵoj por konatigi la rezultojn.

a -a : 1 la unua litero de la E-a alfabeto;
(B) 2 unu el la kvin vokaloj de Eo; la nomo de tiu vokalo;
3 finaĵo de la adjektivo en Eo;
4 (neformale) finaĵo por inseksaj propraj nomoj.

abako : speco de kalkulilo, konsistanta tefe el buletoj ŝoveblaj sur stangetoj.

abandoni : (tr) cedi al asekuristo aŭ alia instanco objekton aŭ tion, kio restas el ĝi post difektiĝo, kaj ŝtatafoje preni la asekuritan sumon, aŭ simile, aŭ rezigni en tuto pri la objekto. *la ŝipanaro abandonis la ŝipon nur nelonge antaŭ la enabismiĝo*
abandono : la ago abandoni, ekz. ŝipon.

abato : estro de monaĥejo titolata abatejo.
(F)

abdiki : (tr) 1 forlasi la reĝecon;
(O) 2 memvole forlasi altan oficon aŭ rangon. *kp. demisii eksiĝi*

abelo : insekto el fam. de himenopteroj, kiu produktas mielon. *en abelujon ne blovu* – ne incitu koleremulon
(B)

abio : arbo konifera. *pp. piceo pino lariko cedro*
(B)

abismo : 1 profundegaĵo; *la ŝipo, renkontinte glacitavolegon, enabismiĝis;*
(O) 2 (f) plena, ĝisfunda ruiniĝo; *miaj esperoj forfalis en la abismon;*
3 (f) plena, esenca, neakordigebla malsameco. *estas abismo inter ambaŭ opinioj kp. faŭko senfundaĵo*

abituriento : mezgrada diplomito, kiu finis la gimnazian kursaron, sukcese plenuminte la koncernan ekzamenon. *havi sian abiturientan diplomon kp. bakalaŭro*
(O)

ablativo : kazo de deklinacio en hindeŭr-opaj lingvoj, esprimanta propre la deirpunkton, k akcesore uzata por esprimi instrumenton, tempon, manieron.
(F)

abnegacio : volonta forgeso pri sia propra utilo aŭ bono. *kp. rezigno sindonemo sinofero*
(O)

aboco : 1 alfabeto; 2 alfabetumo;
3 (f) elementa instruo pri iu ŝcio. *aboco de fiziko, de sennaciismo*

aboli = **abolicii** : (tr) definitive forigi, malpermesi kutimon antaŭe ne laŭjure malpermesitan. *sklaveco estis aboliciita en Usono nur en 1865 vd. abrogacii*

abomeno : forta antipatio, kaŭzata de tre malagrablaj aŭ malnoblaj ecoj de objekto, persono aŭ agp. *abomeno de iu pro io senti abomenon al iu ŝi sentis eĉ ian abomenon kontraŭ mangado; abomena kanajlo!*
(B)

aboni : (tr) kontrakti por ricevi, kontraŭ (antaŭ)pago kaj dum difinita, kutime renovigebla, tempo-daŭro gazeton, komercaĵon, telefonservon ks. *pp. abonkarto abonpago abonanto mi de du jaroj abonas la revuon*
(B)

aborti : (ntr) 1 naski antaŭtempe nevivpovan idon;
(O) 2 (f) halti en sia malvolvo; senrezultiĝi; fiaski. *la senprudenta entrepreno abortis*

abrikoto : frukto de arbo el familio de amigdalacoj.
(B)

abrogacii : (tr) laŭjure nuligi leĝon aŭ dekreton. *kp. abolicii*

abrupta : malagrable subita, (malĝentile)
(B) senprepara. *abrupte demandi, frapi, aperi kp. skui*

absceso : amaso da puso en organikaj teksaĵoj. *kp. furunko*
(F)

absinto : amararoma veg. *pp. absintaĵo : verda likvoro preparita el absinto*
(F)

absoluta : 1 tute sendependa de ĉiu ajn povo aŭ kontrolo; kies aŭtoritato estas senlima kaj tiopova; *absoluta reĝo, povo*
(B) 2 ne elmetita al ia kondiĉo, rezervo, limigo aŭ manko; *absoluta principo, regulo, logiko*
3 gramatike sendependa de la entenanta frazo; *absoluta ablativo, participo*
4 senmiksa; memie pura. *absoluta alkoholo*

absolute : en absoluta maniero = tute, nepre. *lingvo absolute logika estas lingvo senviva ekzistas absolute nenia necesеco, por ke ni forĵetu ...*

absorbi : (tr) okupi ekskluzive la spiriton aŭ/kaj la atenton. *lia laboro absorbis tutan lian atenton vd. sorbi*
(O)

abstini : (ntr) (pro principo aŭ vivkutimo) ne uzi diversajn plezurig-
(B)

Kritikoj, sugestoj, komentoj, kunlaborproponoj estu direktitaj al Lawrence Mee [Lorens Mi], 19 Cranbury Rd., Eastleigh, Hants. SO5 5HB, Britio.

Pri la artikolo de Blázquez pri "IĜ"

Antonio Alonso NÚÑEZ

En IPR 1989/2, pp. 15-21 aperis pli gramatika ol pedagogia artikolo de Félix García Blázquez, "La sufikso -iĝ ĉe apliko al verboj", kiun ni aperigis pro ĝiaj instruadaj implicoj. Ni alvokis al reagoj: spontane alvenintan leteron de Nydia Aydos Krieger vi trovos fine de ĉi tiu artikolo. Ni mem petis reagi koncize s-anon Antonio Alonso Núñez, sciante, ke li profunde kaj fake okupiĝas pri rilataj problemoj. Bedaŭrinde, pri la publikigo de liaj dense tajpitaj kaj pensodensaj 22 paĝoj, kiuj rezonas tute aliel ol konkludas s-anino Krieger, ni devis rezigni, sopirante ekziston de faka revuo, kie tiaj studoj povus aperi tutaj (kopion tamen eblas mendi kontraŭ 3 irk-oj de la redakcio de IPR). Feliĉe, li mem liveris resumon, kiu sekvas ĉi-sube, lardita far la redaktoro nur per kelkaj enmetoj el la studo mem, ĉefe tiuj koncernajn pedagogion. Necese, ĉi tiu parta publikigo ne spegulas fidele la tuton; en la resumo pli ardas la iberie temperamenta diskutemo de Núñez ol en la sobre priargumentita cetero. — La red.

I

En ĉi tiu unua parto mi klopodu pri resumo de la ĉefaj punktoj de tiu artikolo:

(a) PAG kaj PIV konstate asertas, ke la kunmetaĵoj de "-iĝ-" kun transitiva verba radiko subkomprenigas "-ata/-ita", kiel en "kompreniĝi = fariĝi komprenata/-ita".

(b) Plu laŭ PAG-PIV, ekzistas kelkaj tiaj kunmetaĵoj tamen subkomprenigantaj "-anta", kiel en "sciiĝi = fariĝi scianta".

(c) Plu laŭ PAG-PIV, la (b)-kazoj estas malmultaj, kaj troveblaj ĉefe en la komencaj tempoj de la lingvo, ĉar nuntempe oni ordinare uzas prefikson "ek", kiel en "ekscii" anstataŭ "sciiĝi".

(ĉ) Laŭ Blázquez, ĝuste la uzo (b) estas tiu plej logika.

(d) Plu laŭ Blázquez, aldone al (a) kaj (b) doniĝas miksaĵo kun aliaj aferoj kaj nuancoj, kiaj pasiveco, refleksiveco, reciprokeco, distingado de animitaj kaj neanimitaj estaĵoj kun aŭ sen volo kaj kapablo agi, kaj eventuale aliaj aferoj.

(e) Plu laŭ Blázquez, el ĉio ĉi rezultas aŭ vidiĝas surprizo, terurigo, neakcepteblo de pluraj signifoj de unu afikso, malatento al la bezonoj de scienco kaj juro, serioza problemo tiel por gramatiko kiel por instruado kaj praktikado de la lingvo, bezono atenti kiel DLT solvis tion, kion Blázquez konsideras problemo, ktp.

(f) Plu laŭ Blázquez, li venis al la konstatoj kaj konkludoj cititaj en (e) pere de logika rezonado, ankaŭ per analogio ktp.

II

Mia klopodo kompreni tiun artikolon postulis de mi tajpadon de 20-paĝa komentario. Nur pere de tiu katarsa laboro mi eventuale atingis mian celon, kaj tio ebligas, ke mi kuraĝu vortigi jenajn valorjuĝojn:

(a) Nenio estas trovebla en tiu artikolo pri analogio aŭ logiko (lingva aŭ ĝenerala). Temas nur pri amaso da pseŭdaj metafizikaĵoj kaj pseŭdaj logikaĵoj (cetere, de tipo jam delonge tre konata en Esperantio, kaj venanta de memdiraj savantoj de nia sankta, racia kaj scienca afero).

(b) Estas apenaŭ kredeble, ke Blázquez sukcesis preteratenti kaj kontraŭi ĉiujn siajn gramatikajn sciojn. Por apogo de tia aserto mi prezentas nur jenajn tri erojn:

— En sia studo pri sukfikso "-iĝ-", li eĉ ne unufoje uzas la terminon "medialo", kaj eĉ ne unufoje uzas tiun koncepton por formala aŭ semantika argumentado.

— Laŭ li, en la frazo "...negativa saldo ne fariĝis pli granda..." temas pri pasiva signifo, t. e., se mi sukcesis kompreni la artikolon, ke tiu frazo ekvivalentus al "...negativa saldo ne estis farata/farita pli granda..." (!?). La afero estas des pli ŝoka, ke ĝuste "fariĝi" estas la prototipo de ĉiuj verboj kaj nuancoj media-laj. (Vidu eĉ en Fundamenta Ekzercaro, Ekz. 23.4)

— La nekompleteco kaj miseco de citado estas sufokaj.

(c) Tiu artikolo estas, milde dirite, tre, tre nematura. Ĝi bezonas — se oni entute insistas pri ĝi — profundan reverkadon post trastudo, polurado, abunda diskutado inter homoj interesiĝantaj pri tia maniero esplori kaj studi (?) pri E-o. Nur post tia reverkado oni povus ĝin publici en tre specialigitaj revuoj kaj por tre specialismaj personoj. Anstataŭ publikigi ĝin en pedagogi-cela revuo oni ĝin rezervu por Planlingvistiko ks. (*Planlingvistiko ĉesis aperi enkorpiĝante en Literatura Foiro, kaj "ks." povus aludi preskaŭ nur al "Informilo por Interlingvistoj" — ankaŭ tiu konsidero igis nin publikigi la artikolon de Blázquez — la red.*), kaj, se diri mian tutan penson, eĉ ne por tia revuo: la artikolo estas tiom, tiom nematura, ke prefere okazu privata diskutado inter tiuj tre malmultaj E-o-parolantoj, kiuj okupiĝas kaj interesiĝas pri tiaj eksterlingvaj diskutadoj.

Noto. — Bedaŭrinde, ni estas diaspora kolektivo, tiel ke tro multaj el tiaj artikoloj aperas en ordinaraj revuoj. Tio kaŭzas nur damaĝojn al la fakta Eo-vivo. Ni devas trovi manieron iel kompensi la diasporecon sen malutilo al la lingvo.

Mi aldonu mian opinion, ke tia maniero esplori, do ankaŭ ĉi tiu artikolo, estas fuŝa, sterila kaj steriliga por nia afero.

Kio koncernas pedagogion: ĉar ni traktas homojn, ne maŝinojn, estus ne nur nenecesa, sed rekte malutila la enkonduko de tro formalaj reguloj; oni ludu ĉefe sur semantiko. (Cetere, Zamenhof leksemigis ĝin ĝis maksimumo.) Pli-malpli, la fazoj estas jenaj:

A. Trastudo de la Fundamento de Esperanto (FE), kun uzado de nacia lingvo.

B. Post mastrado de FE, ĉio posta okazu jam rekte en Eo; nur en okazo de ekstrema bezono oni uzu nacian lingvon.

C. Oni diskutas/komentas/klarigas en Eo la bazajn semantikajn trajtojn de "-ig-, -iĝ-" (faktitiva, mediala); oni ne bezonas tro detalan difinon, sed nuran ĝeneralan komprenon kaj konsenton pri tio, ke ni ĉiuj parolas pri la sama afero.

Ĉ. Poste oni prezentas ekz. jenan verbotriopon: aŭdi, fali, manĝi. Oni diskutas pri la semantiko de tiuj verboj. Nur kiam ĉiuj gelernantoj konsentas pri ilia semantiko, oni diskutas, kial jes aŭ kial ne (ja nepre surbaze de semantikaj konsideroj; neniel surbaze de vanaj formalaĵoj). Oni diskutas pri la ebleco ŝpari ilin laŭ la konstruo: La akvo bolas, mi bol(ig)as akvon.

D. Kiam estos tute klare, ke temas pri semantika afero, kaj tute ne pri formala regulo, la temo estas matura por lasta konsidero: oni faru ekzemplojn per kelkaj cent diversaj verboj, oni diskutu semantike pri ili, kaj fine oni insistu pri la bezonata elasteco, ankaŭ pri la eventuala neceso iom parkerigi kelkajn, malmultajn ne tre klarajn kazojn (krome, kun indiko, ke la homa cerbo, la homa parolkapablo tion plej facile kaj aŭtomate allasas kaj manipulas, ja kun kondiĉo, ke ne temu pri eksceso jen en la kazueco de idiotismoj, jen pri nurformala vortomanipulo sen komunikparolo ktp.)

(ĉ) Mi sugestas al tiaj esplorantoj, ke ili bonvolu fari jenan eksperimenton: Ili muntu al si du grupojn de komencantoj. Al unu el ili oni simple laŭtlegu, komentu, kaj se bezone, klarigu nur tion, kion PIV diras pri "iĝ-, ig-". Al la dua, oni klopodu klarigi alirojn tiajn, kiaj tiu de Blázquez. Poste, oni kompare studu pri la rezultoj.

Nu, mi jam nun vetas pri jeno: la unua grupo bezonos dekonon de la tempo, kiom bezonos la dua. Krome, la unua ĝuos, ĉar ili konstatos, ke ili frandas sukan kaj simplan lingvon, la dua nur enuos kaj tediĝos, venos al nenia mastrado de la lingvo, sed nur al duboj, al seniluziiĝo pri ĉia ideo pri interlingvo, kiun ili imagos al si nura galimatio de seka, abstrakta regularo pri pseŭdaj metafizikaĵoj kaj pseŭdaj logikaĵoj, havantaj nenian rilaton al la vivo kaj al faktaj lingvoj.

Sekve: laŭ mia veto pruviĝos, ke la metodo, kiun ankaŭ Blázquez sekvas, estas maltaŭga, malutila por lingvo-instruado al homoj, kompren- kaj parolkapablaj mensoj. Oni povus eventuale diskuti, ĉu tia vojo taŭgus por programado de sensciaj, nur-formale laborantaj maŝinoj (mi opinias, ke eĉ ne).

(d) Konklude: tiuj, kiuj volus la homajn mensojn manipuli kiel komputilojn, bonvolu rezigni pri tia malutila tasko.

(e) Fina noto. – Ĉio dirita en la antaŭaj alineoj tute ne signifas, ke mi opinias, ke PAG kaj PIV estus nesupereblaj verkoj. Ĝuste unu el la taskoj, kiuj atendas niajn homojn elstarajn, ja estas poluro de ili, evitado de ripetoj per sistema kunigado de rilataj aferoj ktp. Sed tia laborego postulas ne malpli da kvalito ol montriĝis en iliaj elstaraj aŭtoroj.

LETERO RICEVITA PRI LA SAMA TEMO:

(...)La ĝojo ĉiam ĝuata kiam mi ricevas IPR-on ĉifoje estis pligrandigata pro la legado de la artikolo verkita de Félix GARCÍA BLÁZQUEZ pri la apliko de la sufikso "iĝ" al transitivaj verboj. La verkaĵo estas interesa kaj klariga, brila kaj oportuna. La afero estas pritraktata tiamaniere, ke evidentiĝas la neceso ĝin plinormigi kaj diplomatece ne vundi la honorsenton de la akademianoj... Kiom da tempo mi aplikis por raciigi la uzadon de la sufikso "iĝ" kaj, poste, esti kapabla ĝin transigi logike al la aliaj! Kia ĝenerela leĝo regas ties uzadon? - mi demandis, kaj mi neniam alvenis al kontentiga konkludo; neniam mi atingis tian ĝeneralan leĝon pro tio, ke ĝi ne ekzistas...Ŝajnas al mi, ke (plisimpligante) le konkludoj de García Blázquez estas la jenaj:

a, – Oni devus uzi la sufikson "iĝ" kiam estas *pasiva* signifo en la frazo.

b, – Kiam estas senco de *reciprokeco*, tiu senco estus reliefigata per prepozicio (kun, inter; ekz. intervidiĝi, interkruciĝi).

c, – Kiam estas senco de *refleksiveco*, oni devus ne apliki la sufikson kaj uzi nur la refleksivan pronomon.

ĉ, Ĉe la *aktiva* signifo oni simple forigus la sufikson "iĝ".

Ĉu estas tia la penso de la aŭtoro?(...) Persone mi abomenas ŝanĝojn en la kerno de Eo (...), sed tiu pritraktata prezentiĝas altvalora por la perfektiviĝado de nia amata lingvo.

Nydia Aydos Krieger,
Porto Alegre, Brazilo.

23a Konferenco de ILEI Caerleon, Kimrio

Nemulte sed agrable

Kun 75 partoprenantoj el 19 landoj ni povas priskribi la ĉeestantaron de nia 23a Konferenco kiel buntan sed neniel amasan. Des pli, ke tio inkluzivas plurajn parttempajn ĉeestantojn, tiel ke ĉi tio estis nia plej malgranda konferenco de pluraj jaroj. Tamen, la statistiko ne klarigas ĉion, ĉar tion altigis en lastaj jaroj turismaj grupoj ne vere partoprenantaj la konferencon. Efektive, la ĉeestantaro restas rimarkinde – eble eĉ timige – konstanta; la granda plimulto estas tre fidelaj kaj multjaraj ĉeestantoj. La averaĝa partopreno de labor-kunsidoj kaj prelegoj estis inter 30 kaj 50. Estas kuraĝige konstati almenaŭ kelkajn ĉeestantojn kaj prelegantojn el kutime fermitaj landoj de orienta Eŭropo, el Azio, Nordameriko kaj Aŭstralazio.

Agrabla estas la kutimo de ILEI konferenci ekster ĉefurboj; la vilaĝa ĉarmo de Caerleon, la situo de eble la plej renomaj romiaj ruinoj en Kimrujo, plenumis trafe tiun kutimon, kies sekvon ni povos ne nur sentime sed eĉ superabunde atendi ankaŭ en la sekvontaj du jaroj.

La kadrotemo estis 'Motivado en la instruado de Esperanto', pri tio kvin ĉefaj referaĵoj estis prezentitaj, la plej fake elstara estis tiu de Till Dahlenburg (GDR) kiu esploris interesan sed ne ĉiam konstatatan fakton, ke ne nur la motivado de la lernantoj gravas, sed ankaŭ tiu de la instruisto. Ni donis al lia teksto unuan lokon en ĉi tiu numero. Tri el la prezentaĵoj esploris grandparte per praktikaj ekzemploj la motivigajn eblecojn de humuro, dramo kaj muziko/ludo. Tiujn vivigis respektive Reto Rossetti (GB), Stefan MacGill (H) kaj Stephen Thompson (GB). Kompletige Zsuzsa Barcsay montris kiel eĉ ekzamenoj – unuavide timigaj torturiloj – tamen povas doni fortan motivigon, kaj ne nepre negativan. Ŝi skizis la bone evoluitan kaj parte ŝtate agnoskitan sistemon en Hungario.

La konferenco aliris sian programon en tre demokrata maniero, spegulanta la intiman kaj familiecan etoson; pro tio la plimulto de la intervenoj ne rilatis al la temo, kaj havis longecon de inter 20-30 minutoj. Tiu formulo permesis al la plimulto de konferencanoj iam en la semajno prezenti ion. La plimulto parolis pri demandoj de instruado aŭ ekzamenado en sia hejm-regiono: Vera Barandovská: Esperanto-instruado en Ĉeĥoslovakio; Frank Buckley (GB): Komputilo kaj instruado; Tatjana Luskutova: Esperanto-instruado en Sovetunio; S. MacGill: La novaj ekzamenoj de UEA/ILEI; Miroslav Malovec: Korespondaj kursoj en Ĉeĥoslovakio; Dan Maxwell (USA/NL) Historia skizo pri

eksperimentoj pri E-instruado; Josef Murĵan: E-instruado en Israelo; Péter Rados: Lerneja eksperimento okazanta en Hungario; Reto Rossetti: Pri la internacia licencia ekzameno lanĉita en Britio; Mila van der Horst-Kolinska (NL): Pri la aŭdvida kurso de la fratoj Sekelj.

Plia prelegaro traktis movadajn iniciatojn kaj aplikadon de Esperanto – Marin Bâcev (BG): Internacia korespondado; Kimie Markarian (GB): Sorobano; Lawrence Mee (GB): Pri Interetna vortaro (v. artikolon ĉi-numere); William Simcock (GB): Geonkloj esperantistaj; Ghislaine Tilleux (B): Zamenhof bildrakonte kaj novtipa ludo nekonkurenca; Georgo Winkler (D): Pri la E-centro en Bjalistoko.

Tiu lasta estis suplementita per montro de la videofilmo pri la projekto. Dua filmo prezentis Cseh-metodan lecionon de Audrey Childs-Mee.

Kadre de la konferenco okazis C-nivela Cseh-seminario, kun ekzamenoj fine. Rezulte de tio ricevis fine instrurajtigajn diplomojn s-inoj Sofia Mensen (NL) kaj Carla de Lorenzi (I), kaj atestilon pri partopreno Gerda Dercks (NL).

Pri la malfermo, ĝeneralaj kunsidoj kaj fermo vi povos legi en sekva artikolo. Tio permesas al ni pluiri tuj al la distraj vesperoj. La ekscesa diligenteco de la estraro de ILEI (pri kio en la post-sekva artikolo) malebligas la nunajn verkantojn doni multajn informojn pri la vesperaj programoj. La konferencon taŭge lanĉis altnivela arta vespero en la dimanĉo (6a de aŭgusto) kun ĥoro kaj 14-jaraĝa harpludistino. Kimraj ĥoroj estas kompreneble mondfamaj. Lunde okazis komuna vizito al la ne malmultaj kaj etosplenaj vilaĝaj trinkejoj. Laŭ la etoso de la grupo revenanta el la vilaĝo, kiam la estraranoj direktis sin post-



Alia pedagogia aranĝo en Britio: La infana kongreseto de la UK arigis 33 infanojn el 15 landoj, kiuj interkompreniĝis, kune ludis kaj lernis en Esperanto. Jen la rezulto al kiu strebas niaj instruistoj-membroj.

kunvene tien, sukcesis ankaŭ tiu vespero. Marde Reto Rossetti frandigis nin tra menuo da ŝercoj, kiuj spicis sian analizon de la mekanismoj de humuro. Merkrede, s-ro Arnold Pitt (la motoro de la konferenca komitato) prezentis lumbildojn pri Kimrujo, kiu estis bela kompletigo de la tiutaga ekskurso, kiu portis nin al la popola subĉiela muzeo (skanzeno) de St. Fagans, kaj la renoma kastelo de Carphilly (*Kerfili*). Ĵaŭde la grupo *Du Lally Trapp* regalis nin per popoldanca prezentaĵo, kaj poste konferencanoj regalis sin mem per dancado sub la gvido de spertulo John Ibbotson. La memdistra principo atingis plenan regon vendrede, kiam konferencanoj mem kompilis tre varinivelan koncerton. En tiu momento la ferma kunsido, priraportita poste, estis jam okazinta.

Kadre de tiu fermo la prezidanto esprimis la koran dankemon de ĉiu el la forte laborintaj LKK-anoj per donaco de libroj, dankis ĉiujn prelegintojn kaj la personaron de la kolegia konferencejo. Konklude, li diris, ke la 23a Konferenco estis fruktodona kaj preparis la vojon al pli ampleksa kaj intensa laboro.

es/smg

Bunta, familieca, sed ĉu sufiĉa?

Pri nia ĵusa konferenco jen persona kaj miksita prijuĝo. Sed la negativaj aspektoj de tio rilatas ĉefe al niaj konferencoj ĝenerale kaj ne specife al tiu en Caerleon. Ĉi tie oni liveris al ni tre taŭgajn ejojn kaj servojn: abundajn manĝojn, konvenajn, bone ekipitajn salonojn, helpemajn deĵorantojn. La faka programo meritas la jam uzitan adjektivon: bunta — ne tiom multe pritema, ne tiom faka, kun tre varia nivelo. La Estraro produktive laboris, kaj unuafoje povis senti sin vere teamo, kvankam ĝi okupiĝas unuavice pri specifaj projektoj pli ol globalaj celoj kaj kampanjoj.

La ĝeneralaj kunsidoj ja donis vastan eblecon por prisondo de opinioj kaj libera priparolado pri multaj temoj, sed pro la fakto, ke komitato ne estis formale kunvokita, ĝi ne povis fari decidojn, kaj tro ofte debatis temojn, kiuj ne estas maturaj por klaraj antaŭpaŝoj. Pro la malmultaj partoprenantoj ĝi ne estis adekvate reprezenta de la membraro.

Ni ĉiuj forportis belajn memorojn el tiuj kimraj tagoj, ĉiu memoras la Esperantan flagon flirtantan brave super la silueta formo de la kolegia ĉefkonstruaĵo kronanta la vilaĝan monteton kaj klare videbla eĉ de pluraj kilometroj for. Tio simbolis la tradician movadan etoson kiu forte sentiĝis tra la tuta aranĝo.

En niaj estontaj konferencoj estos agrable ne perdi tiun familiecon, sed ni devas nepre logi pli da novaj E-instruistoj, inter ili junaj, en nian rondon, kaj en kunlaboron, por ke niaj konferencoj havu pli da partoprenantoj, pli fakan nivelon kaj ludu pli centran rolon en nia tuta strategio altigi la kvanton kaj kvaliton da Esperanto-instruado tra la mondo.

smg

24a INTERNACIA KONFERENCO DE

I.L.E.I.

(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

Internacia Esperanto-Centro, Hotelo "Hanabanilla", Kubo

22-29 julio 1990



Kadrotemo de la konferenco:

"Naciaj trajtoj de la instruado kaj lernado de Esperanto"

- Tipaj eraroj en Esperanto depende de la gepatra lingvo de la instruanto/lernanto, sur la kampoj: fonetiko, morfologio, vortfarado, sintakso, leksiko;
- Landaj specifaĵoj en la kvalifikado kaj pliperfektigado de Esperanto-instruistoj;
- Eksterlingva enhavo de landaj lernolibroj, instru- kaj lern-helpiloj kaj aŭtodidaktigaj materialoj;
- Tradicie aŭ moderne determinitaj metodikaj specifaĵoj en fremdlingvo-instruado sub aparta konsidero de Esperanto-instruado.

Aliĝadreso: M. Jones, 41, Causeway, Chippenham, Wiltshire, SN15 3DD, Anglujo. Tel.: 0249/656041.

La loko

La hotelo "Hanabanilla" troviĝas meze de la insulo Kubo sur la montoĉeno "Escambray", ĉe la lago "Hanabanilla". Pro la alteco de la loko, la klimato eĉ somere estas agrabla, kaj la ĉirkaŭanta natura pejzaĝo estas raviga kaj impona. La distanco de Havano estas proksimume 300 kilometroj. En la procinco "Villa Clara", kie situas "Hanibanilla", estas entuziasma kaj vigla esperantistaro.

La konferencejo

La hotelo "Hanabanilla" disponas pri:
- 1-, 2-, kaj 3-litaj ĉambroj;
- klimatizilo, radio kaj bano en ĉiu ĉambro;
- televidilo je ĉiu etaĝo;
- klimatizita restoracio kaj trinkejo;
- alia restoracio kaj trinkejo, naĝejo kaj kabaredo.

Kotizoj

La prezoj inkluzivas:
- 7 tranoktojn en "Hanabanilla";
- transporton Havano-Hanabanilla-Havano per komuna buso;
- matenmanĝon kaj unu manĝon tage;
- la tutan konferencan programon, inkluzive de unu faka ekskurso.

unulita ĉambro	:	564 NLG (guldenoj)
dulita ĉambro	:	473 NLG
trilita ĉambro	:	282 NLG

Bonvolu elekti la por vi plej taŭgan pagmanieron:
a. al la kasisto de ILEI: poŝtĝirkonto 682117-7 (Stockholm)
"La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby, Svedujo.
b. per ĉeko al la sama adreso.
c. al UEA (pĝk 378964), indikante "por la 24a ILEI-konferenco", kodo: ilei-k,
UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
ĉ. aliĝontoj el netranspagipovaj landoj bonvolu aliĝi nun provizore, kaj vi ricevos poste pli da informo pri la ebleco pagi almenaŭ parton de la kotizo per enlanda mono.

Pliaj informoj

Aliĝintoj ricevos pli detalajn informojn pri la programo, kursoj, la komuna vojaĝo.
Laŭbezone Cubatut povas aranĝi loĝigon en Havano antaŭ aŭ post la konferenco. Tiun eblecon ni ankaŭ klarigos al aliĝintoj.
Atentu, ke la unua tranokto en Hanabanilla estas de dimanĉo-lundo, 22/23a de julio. Partoprenantoj en la UK sekve aranĝu mem pere de la UK-servo tranoktadon por sabato-dimanĉo 21/22a de julio!

Ekzamenoj

La elementaj kaj mezaj ekzamenoj de UEA/ILEI estos kompreneble oferataj en la Universala Kongreso, sed se estas sufiĉa interesiĝo, ni povos proponi ilin ankaŭ en la ILEI-konferenco. Pliajn informojn pri la ekzamenoj vi trovos en la eldonita libreto (6,60 gld. ĉe UEA). La ekzamenkotizo varias laŭlande de 25 ĝis 40 guldenoj. Kiu volas kandidatiĝi, bv. indiki tion sur la aliĝilo.

Cseh-Seminario

Kadre de la 24a ILEI-Konferenco, Internacia Esperanto-Instituto (IEI), kunlabore kun ILEI, okazigos Ĉe-seminarion por estontaj Cseh-instruistoj, kiuj plenumos ĉiujn partoprenkondiĉojn, nome: sukcesajn partoprenojn en seminarioj A kaj B, gvidadon de tuta Cseh-metoda kurso, raporton pri ĉi tiu al IEI antaŭ 1990-05-01. La partopreno estas aparte pagenda al IEI. Pliaj informoj haveblas de: IEI, Riouwstraat 172, 2825 HW Den Haag, Nederlando. Se eble, bonvolu aldoni al via informpeto internacian respondkuponon.

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 24a Konferenco de ILEI en Hanabanilla, 22-29 julio 1990.

Familia nomo ..... Antaŭnomo .....

Profesio ..... Naskiĝdato ..... Sekso .....

Strato ..... n-ro .....

Poŝta kodo ..... Loĝloko ..... Lando .....

Subskribo .....

Bonvolu krucsigni

Mi mendas ĉambron unulitan ☐ / dulitan ☐ / trilitan ☐ kaj deziras loĝi kun ..... kiu ankaŭ aliĝas.

Mi manĝos vegetare: jes: ☐ ne: ☐

Mi sekvas jenan dieton .....

Mi partoprenos la Cseh-seminarion C kaj jam pagis al IEI ☐
sed ne pagis al IEI ☐

Mi intencas partopreni la krompagendan ekzamenon elementan ☐
mezan ☐

Aliaj deziroj .....

La kotizon de ..... guldenoj mi pagis je dato .....
per maniero a. ☐ b. ☐ c. ☐ ĉ. ☐.

Mi intencas partopreni en la Universala Kongreso en Kubo:
jes ☐ ne ☐

Mi alvenos al Kubo je la komenco de la konferenco: jes ☐

Subskribo ..... Dato .....

Spaco rezervita al LKK

La aliĝilo alvenis je ..... Aliĝnumero .....

La pago alvenis je ..... Sumo .....

Ankoraŭ pagendas .....

Ĉambronumero ..... kun .....

23a Konferenco de ILEI Caerleon, Kimrio

Protokoloj de la ĝeneralaj kunsidoj

Malfermo: dimanĉe la 6an de aŭgusto

Ĉeestis surpodie Edward Symoens (ES), Audrey Childs-Mee (ACM), Bertil Andreasson (BA), Malcolm Jones (MJ) kaj s-ino Rita Thyer, prezidanto de LKK. S-ino Thyer bonvenigis la ĉirkaŭ kvindek partoprenantojn al Kimrio kaj la konferenco. S-ro Symoens, la prezidanto de ILEI parolis enkonduke pri:

- **a:** la devoj de ILEI-membroj interlige kun aliaj esperantistoj
- **b:** la nuna lingva stato en la mondo, kaj precipe en Eŭropo
- **c:** politikaj iniciatoj, kiuj donas impulson lerni pliajn fremdajn lingvojn
- **ĉ:** diversaj instrumetodoj por individua, grupa aŭ perpoŝta studado
- **d:** instruniveloj de baza ĝis profesia (instrurajtiga, turisma ktp.)
- **e:** rimedoj – instru- **kaj** lego-libroj, ludoj, kasedoj, komputila programaro.
- **f:** ekzamenoj.

Poste MJ invitis salutojn; reprezentantoj el 18 landoj aŭ regionoj salutis la konferencon. ES dankante fermis la kunsidon.

Lunde, la 7an de aŭgusto

Ĉeestis seskapa estraro: ES, Stefan MacGill (SMG), Till Dahlenburg (TD), ACM, BA, MJ, kaj ĉ. 35 membroj.

1) ES prezentis la financan situacion de ILEI laŭ labor-dokumento 1. Post pluraj intervenoj stariĝis komisiono por pritrakti starigon de fonduso, kun i.a. s-ino Lannergard kaj s-ro Willkommen.

2) S-ro Lorens Mi mallonge prezentis sian novan projekton pri interetna vortaro de ordinara Esperanto.

3) SMG resumis la rezolucion pri edukado, kiun preparis ILEI-anoj kaj kiun akceptis la Komitato de UEA. La ĉeestantoj aprobis la dokumenton.

4) ES prezentis labordokumenton 2 pri la rilatoj inter ILEI kaj UEA. Post diskuto, decidite prokrasti decidon pri aliĝo kiel faka asocio ĝis klariĝis la implicoj por niaj formalaj rilatoj kun Unesko.

5.) ES anoncis, ke la 24a ILEI-konferenco okazos en Kubo de la 22a ĝis la 29a de julio 1990.

6.) ES esprimis zorgon pri la 'Tago de la Lernejo' dum Universalaj Kongresoj; necesas konstanta kunordiga organizanto.

Marde, la 8an de aŭgusto

Ĉeestis estrare ES,SMG,BA,TD,MJ kaj 31 membroj.

1) ES enkondukis labordokumenton 3 pri oficejo por ILEI; diversaj intervenantoj subtenis Roterdamon, Hagon, Budapeŝton kaj KCE. Aŭdiĝis argumentoj por kaj kontraŭ ĉiu. Decido, ke la estraro plu konsideros la eblecojn, konsciante, ke oficulo ne oficejo estas la kerna demando.

2) SMG gvidis diskuton pri la ekzamenoj – spertoj de la pasinta jaro, la nova gvidilo, supera nivelo atendata, venontaj sesioj (KCE januare kaj aprile, San-Francisko kaj UK somere, se eble en Ĉinio novembre de 1989 kaj iam en Hungario aŭ Slovakio), problemo pri malmulto da rajtigitaj ekzamenantoj kaj ilia enkondukado. Estonte seminario dum la konferenco enkonduku ekzamenantojn. S-ro A. Pitt proponis la novan superan ekzamenon de EAB kiel eblan bazon por la superaj ekzamenoj de ILEI/UEA. S-ino Dazzini subtenis. TD motivigis la kialon por gramatika antaŭtesto. Diskuton sekvis aprobo de tiu decido. Prof. So Gilsu petis indulgon kaj helpon por azianoj, kiuj havas malfacilaĵojn rilate la prononcadon de kelkaj E-sonoj. Li mem, kiel estrarano de UEA, respondecos pri la 'Azia fondaĵo', kiu povos financi la kreon de taŭgaj instruiloj. SG akceptis proponon de ES kaj iĝas liganto por ILEI kun aziaj landoj, unuavice kun Koreio, Japanio kaj Ĉinio.

3) La ĉi-jaran enketilon pri lerneja instruado de Eo prezentas SMG sub la ŝildo 'Septembro – Monato de Internacia Enketado' – oni ensendu respondojn tra la landaj sekciestroj.

4) Internacia lernolibro estas prilaborata de SMG kaj Kovács Márta en konsultiĝo kun aliaj (i.a.Princz Oszkár). Ĝi estos unulingva kaj situaci-komunika, kaj formos bazon por tuta lernpakaĵo kun laborlibro, porinstruista gvidilo kaj sonbendo.

5) *Internacia pedagogia revuo* bezonas aldonan redakcian helpon por certigi regulan aperadon.

Vendrede matene, 11a de aŭgusto

SMG kaj MJ ne ĉeestas pro ekzamenaj devoj. BA protokolis.

1) BA prezentis la financan raporton; sekvis demandoj kaj rimarkoj. Pri la intenco altigi la membrokotizon, decidite skribe voĉdonigi la sekciestrojn septembre. Oni anoncis la akcepton de nova sekcio de Bulgario kaj klarigis, kiel necesos solvi la transigon de la kotizoj. S-ro M. Bâcev proponis skribon de gratul-letero al Bulgario; ES jam antaŭvidis fari tion.

2) ES informis pri estraraj decidoj pri la konferenco en Hanabaniljo: datoj, kotizoj, temo. Sekvis demandoj.

3) ES informis pri la 25a konferenco, ke ĝi verŝajne okazos en Norvegio, ke ĝi estos jubilea kaj ke dum ĝi la asembleo devos elekti novan estraron. ES vokis por sinproponoj de tiuj, kiuj bonvolos kompili historion de ILEI por festi la jubileon. Dokumentoj de ILEI nun troviĝas en Massa, Budapeŝto kaj eble en Ljubljano.

4) Responde al s-ro Murĵan, BA diris, ke ILEI-membrokartoj estas riceveblaj de li, se li ricevos la nomojn de membroj ene de iu lando.

5) Gvidlinioj por sekciestroj estas sendotaj al ĉiuj sekciestroj.

6) Responde al demando de s-ino Dazzini, rilate ILEI-agadon lige al fremdlingva instruado en la EK, ES indikis, ke ampleksa respondo estos donita poste.

Ferma kunsido: Vendrede posttagmeze.

Ĉeestis sesope la Estraro kun S-ro Amador Diaz, prezidanto de EAB kaj 37 aŭskultantoj.

1) ES bonvenigis s-ron Diaz, kiu salutis la konferencon kaj parolis pri motivado en la movado mem, pri la problemo reteni membrojn post kiam ili lernis la lingvon. Li indikis, ke ankaŭ ĉi tio povus esti problemo pritraktinda dum la instruado de la lingvo.

2) ES simbole transdonis atestilon al s-ro R. Burnay el Belgio, kiu estis unu el la naŭ sukcesintoj en la ekzamenoj de UEA/ILEI en Brajtono. ES transdonis ankaŭ Cseh-diplomojn al la du novaj sukcesintoj.

3) S-ro Pitt voĉlegis salutleteron de d-ro Albert Goodheir, prezidanto de la brita ILEI-sekcio, ETA. Tiu bedaŭris sian foreston pro la skota postkongreso, sed bondeziris al la konferenco.

4) SMG prezentis konkludan alparolon pri motivado, resumante la kontribuaĵojn de la semajno. Li apartigis motivadojn de 'interne' kaj de 'ekstere', menciante muzikon, ludojn, dramon, la etoson kreitan en la klasĉambro pro la instruisto, la lernejo, pro urbaj, regionaj kaj naciaj faktoroj, pro komercaj kaj modaj influoj. Li komparis la avantaĝojn de naciaj kaj internacia lingvoj en instruado, aplikado kaj en la socio.

5) ES resumis la atingaĵojn de la semajno, emfazante unue la bezonon, ke instruistoj adaptiĝu al novaj cirkonstancoj. Precipe bonvena estas la nova situacio en Sovet-unio. La bilanco de la semajno estas impresa, kun du konferencoj en perspektivo kune kun la 'Tago de la Lernejo' en Havano. TD klarigis pri la tri koncernaj temoj kaj aldonis personajn dankvortojn kaj donacon al la LKK. ES listigis la laboron faritan kaj -otan de la estraro (vidu aparte). Li komunikis la estraran subtenon por la projekto de la interetna vortaro, pro kiu s-ro Mi kortuŝite dankis. ES informis, ke pro liaj grandegaj kontribuoj al la instruado de Esperanto eĉ en plej malfacilaj cirkonstancoj (v. *IPR* 89/2) la estraro unuanime nomis d-ron Saheb-Zamani el Irano honora membro de ILEI, kion la ĉeestantoj per aplaŭdo konfirmis.

Kore dankinte la stabon de la konferencejo kaj la membrojn de LKK, al kiuj li transdonis donacojn, ES fermis la kunsidon kaj la konferencon.

laŭ la protokolo de Malcolm Jones.

Estraro: Ĉiuvespere, multdecide

En Kerkrade nova estraro de ILEI estis elektita kun trijara mandato; tie eblis nur disdividi la laborfakojn, prizorgi tujajn konferencajn devojn kaj plej skize interŝanĝi ideojn pri la estonta laboro. Tra la jaro kelkaj projektoj ja atingis rezultojn, ĉefe pro la laboro de unuopaj estraranoj sur siaj terenoj. Sed mankis ankoraŭ la elformiĝo de tiu teama spirito, kiun eĉ sennombraj estrarleteroj ne povas liveri. Pro la disfalo de la planoj estrarkunsidi dum la jaro, tiu necesa procezo prokrastiĝis ĝis nia nuna konferenco. Per abundo da kunsidoj ni kompensis tiun antaŭan mankon. Plie, la kunsidoj havis aferecan karakteron, ĉefe pro teknikaj kialoj – unue la formuligo komence de klara tagordo – due, preciza protokolado de Audrey Childs-Mee, kiu zorge notis la decidojn kaj taskojn leviĝintajn el tiuj decidoj. Tiel nia protokolo iĝis labordokumento, uzota tra la jaro kaj en venontaj kunsidoj por rigore kontroli ĉu taskoj estas faritaj kaj kiom ni plenumis niajn intencojn. Pro la protokolo facilis krei laŭmonatan planon, kun detalaj devoj por ĉiu estrarano en fiksa sinsekvo. Tiu dokumento nun hantas la laborĉambrojn de ĉiu teamano, kaj estos nia mezurilo en la venonta estrarkunsido en Budapeŝto (22-24 feb.) organizita paralele kun nacia pedagogia aranĝo por Eo-instruistoj. Tiu principo ĉiam fiksi la sekvan kunvenon dum la antaŭa, ĝis nun ne praktikata, estas ege grava. Regula kunvenado almenaŭ dufoje jare esencas, por ne nur teni teaman senton, sed ankaŭ starigi limdatojn, por fortigi entuziasmon kaj labor-disciplinon.

Se kritiki ion, estu ke la nuna laboro konsistas el ĉefe specifaj projektoj, ĉiuj unuope iel gravaj, sed ne tre grandaj. Ni ne vidas ankoraŭ nian globalan strategion spegulita en klara detala plano. Tra la jaroj kelkaj tre vastaj ideoj estis proponitaj – la samtempa lanĉo de instruado de Esperanto en pluraj landoj, grandskala aliro al edukaj instancoj, ktp. Tiuj planoj ne trovas specifan lokon en niaj tagordoj ĉar momente ni ne havas la laborfortojn ilin realigi. Estonte ni pluigu la nunajn limigitajn projektojn(statistikado, ekzamenoj, kursoj, eldonado) sed ankaŭ entreprenu kelkajn zorge elektendajn pli ambiciajn projektojn, por kiuj ni havas aŭ povos trovi la fortojn, kaj kiuj kontribuos utile al tiuj globalaj celoj pri kiuj ni revas, sed ne kapablas ankoraŭ rekte alfronti. *smg*

Resumo de estraraj decidoj

ILEI Konferencoj: Ni nomis Malcolm Jones estrarano pri konferencoj; li rilatos inter LKK kaj la estraro kaj prizorgos varbadon. Li kaj nia kasisto preparis aliĝilon por la venonta konferenco, kiu estos aldonita al ĉi tiu IPR. Decidite estonte oferti pli grandan varion en la loĝigaj kategorioj por faciligi partoprenon el pli vasta gamo de landoj.

25a Konferenco: Kunlabore MJ kaj BA serĉas kongresejon inter norvegaj popol-altlernejoj. Estos elektojaro (Zsuzsa Barcsay konsentas denove prezidi la elekto-komisionon) kaj nia arĝenta jubileo. Rilate tion ni jam alvokis pri verkado de historio de ILEI; kunlaboremuloj anoncu sin al Márta Kovács, p/a Hungara E-Asocio. La konferenca temo estas: "Konsciigo pri la lingvo-problemo en la mondo pere de la Esperanto-instruado."

Tago de la Lernejo, Havano: La temo estos: "Naciaĵoj kaj internaciaĵoj en Esperanto-lernmaterialoj." Faka pretigo: T. Dahlenburg.

Rilatoj kun UEA: La propono de UEA, ke ni forlasu nian unikan statuson (kunlaboranta laŭ aparta interkonsento) kaj iĝu aliĝinta faka asocio estis nek estrare nek ĝenerale kunside solvita. Restas esplori, kio povus okazi al niaj konsultaj rilatoj kun Unesko (en kategorio C) post aliĝo al UEA, kiu havas rilatojn (en kat. B). La estraro opiniis grave, ke ILEI estonte kunlaboru kun UEA laŭ freŝa interkonsento; tio ne nepre estu spegulita formale en la nova rilato, sed difino kaj traktado de tiu interkonsento antaŭiru aliĝon. La neceson por tia interkonsento parte klarigas la sekva artikolo. Malneton pretigos SMG.

Pedagogiaj kursoj: La estraro fiksis precizajn financajn kriteriojn rilate al la delego de respondecoj al mag. Irena Szanser pri la pedagogiaj kursoj kaj ĉiu alia kunlaboro..

Fondaĵo Szerdahelyi: Decidite starigi tiun fondaĵon kun propra regularo por financi novajn eldon-projektojn, la kreon de esplor-laboraĵoj, kaj faciligi aliĝojn al pedagogiaj kursoj ks. BA kaj ES ellaboras regularon.

Eldona fako: Decidite eldoni la 43-paĝan verkon de E. Symoens 'La soci-politika, pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto.' Ĝi estas jam eldonita en Esperanto de UEA, en la nederlanda de Flandra Eo-Ligo; ILEI eldonis ĝin france kaj eldonos ĝin angle, por pli bone aliri edukajn instancojn. Decidite, ke la tekstoj por la pedagogia kurso de Mag. I. Szanser reeldoniĝu en teknike pli taŭga vesto ĝis la tria kurso en aŭgusto 1990. TD pritaksu la materialon flanke de ILEI. Pliaj eldonprojektoj estas studataj.

Novaj sekcioj: Precizigite, ke aliĝojn de novaj sekcioj akceptu de la tuta estraro. Aliĝa formularo estis pretigita. ILEI akceptis bulgaran sekcion kun trideko da membroj.

Sekcioj: ES pretigis gvidilon por sekciestroj, kiu klarigas procedurojn, devojn kaj dezirindajn agadojn. Sekciestroj estos petaj liveri jarraporton en majo 1990, tiel ke la venonta konferenco havu pli adekvatan superrigardon pri nia landa agado.

Honora membro: La Estraro decidis aljuĝi honoran membrecon al d-ro Saheb Zamani de Tehrano, Irano.

Ekzamenoj: La estraro notis la aperon de la gvidlibro, kaj ĝian rapidan disvendon. La ekzamena komisiono kunsidis plurajn horojn, grandigis la nombron da ekzamenantoj ĝis 23, konstatis, ke de post januaro 33 personoj sukcesis ekzamene, precizigis poentumajn principojn, decidis fortigi la testadon de konoj pri la Eo-kulturo, ne nur en la parola, sed ankaŭ en la skriba parto de la meza ekzameno, kaj surpaperigis principojn, formojn kaj enhavon por la kreata supera nivelo. Tiun lastan kunordigas T. Dahlenburg.

Naturdotitaj kaj talentaj infanoj: La prezidanto interrilatos kun Ronald J. Glossop pri kunlaboro kun tiu asocio kaj partopreno en ĝia konferenco en julio 1991 en Hago (ne Nijmegen, kiel dirite en IPR 89/2).

Infanoj ĉirkaŭ la mondo: La estraro decidis kunlabori kun ĉi tiu asocio, fondita en 1987 en San Diego (Usono) kies celoj estas: enkonduki E-on al infanoj en multaj landoj, helpi ilin komuniki kaj lerni pri infanoj en aliaj landoj kaj proponi malmulte- aŭ senkostajn instru-materialojn.

Statuto kaj regularo: La estraro volas revizii la nunan regularon kaj eble ankaŭ la statuton por adapti ilin al la evoluinta situacio kaj klarigi procedurojn. Proponoj kaj konsiloj estas bonvenaj ĉe la kunordiganto: s-ro Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando.

Koresponda kurso: Konscia pri la graveco de aktualigita internacia koresponda kurso, ILEI akceptis proponon de Andrej Pettyn kolekti informojn tiuteme, cele al preparo de nova kurso. Kontaktadreso: A. Pettyn, Skytka 46, PL-05-822 Milanówek, Pollando.

Kotizoj: Ĉi tiuj dum multaj jaroj restis senŝanĝaj, sed la kostoj de la Ligo serioze altiĝas. La estraro konscias, ke multloke la nuna kotizo estas alta kaj ne ĉiam transpagebla. Ĝi tamen proponas altigi la kotizon de 40 al 50 svedaj kronoj kaj voĉdonigos la sekciestrojn pri tio. Ĝi tion faras ĉar en la landoj, kie ILEI elspezas, kaj kie troviĝas la plimulto de la membraro, la nuna kotizo estas tre modesta. La kasisto rajtos, same kiel nun, rilati flekseble kun sekcioj kun ekonomiaj aŭ transpagaj malfacilaĵoj. Sekciestroj petatas informi nian kasiston pri la nivelo de la enlanda kotizo, por eviti malegalecon inter aliĝado rekte al ILEI kaj tra sekcioj.

Internacia Metodika Seminario: Ni antaŭvidas, ke la 8a IMS okazos en Kaŭnas, Litovio en aprilo 1990.

Pluraj aliaj temoj estis traktitaj, sed ili estas raportitaj aliloke en ĉi tiu numero de IPR.

---laŭ gazetara komuniko de E. Symoens

ILEI EN LA UNIVERSALA KONGRESO

EnkondUKe

Niaj membroj certe jam ricevis diversajn raportojn pri la Universala Kongreso okazinta en la apudmara Brajtono (suda Anglio) fine de julio 1989. Vi jam legis, ke ĉi tiu 74a UK allogis 2265 kongresanojn el 55 landoj.

La komitato: strUKture kaj plUKonstrue

Kiel kutime en elekto-jaro, la kunsidoj de la komitato estis aparte tempopostulaj kaj liveris interesajn rezultojn. Unuafoje en multaj jaroj, por la lokoj de la novaj B-komitatanoj, elektitaj de la membroj, estis konkuro inter pli da kandidatoj ol lokoj; similaĵo ripetiĝis pri la prezidanta loko, kiun aspiris du kandidatoj, Josimi Umeda kaj John Wells, la dua ĝin akirinta jam komence de la UK. Dorlotita per tiom da demokratio, komitatanoj ekribelis pro manko de elekteblo por la ceteraj estraraj postenoj kaj longiĝis konsiderinde la elektoprocedo, kiu interalie forrabis de ni nian ILEI-prezidanton, kiu samtempe aktivis en tiu elektokomisiono.

Fine tamen ni havas ne nur novan prezidanton kun senteble alia rego-stilo, sed ankaŭ ege novan estraron – nur Grégoire Maertens restas el la malnova teamo – tiel, ke necesos multa klopodado, ĉu kutimiĝi al la labormetodoj de antaŭaj estraroj, ĉu elformi proprajn. ILEI povas ĝoji pro la estraraniĝo de prof. So Gilsu, kiu estas nia sekciestro en Koreio. Krome pluraj aliaj estranoj havas ĉu profesiajn ĉu aktivajn ligojn kun edukado, kaj nia prezidanto konservas statuson de observanto ĉe la Estraro de UEA. Inter la komitataj decidoj plej interesaj estas la akcepto de tri novaj Landaj Asocioj, la longe atendata soveta aliĝo, kaj la ne tiom atenditaj petoj de la refonditaj litova kaj latvia asocioj, kiuj post multa komisiona kaftrinkado ĉirkaŭ kaj cerbumado pri principoj kaj precedentoj, estis akceptitaj. La Komitato akceptis altigi la aĝlimon de TEJO en UEA de 26 ĝis 30. La Strategia Plano estis akceptita en amendita formo, kies teksto, konforme al la Leĝo de Murphy, atingis la IPR-redakcion du tagojn post la forsendo de la recenza artikolo, kiu aperis pri ĝi en numero 89/1, p.12. Kvankam tie troviĝis kelkaj enhavaj ŝanĝoj, i.a. por konkretigi la agadon pri Afriko, la ĉefa novaĵo estis struktura. Pluraj komentantoj sentis la

malharmonion inter la komenca kaj fina partoj de la raporto, kiun ni mem komentis, kaj la struktura ŝanĝo klopodis ripari tion. Sekve nur la komencaj kvin ĉapitroj restas sub la nomo 'Strategia Plano' kaj la lastaj kvin portas la etikedon 'Laborplano 1990-93'. Do, restas valida nia kritiko pri la manko de konkretigo ĉirkaŭ la difinitaj prioritatoj, kaj restas al ni la tasko tion fari pri la edukaj prioritatoj.

Nia ĉi-jara eduka rezolucio al la Komitato plurfoje referencis al la Strategia Plano; ĝi bilancis kiomgrade ni plenumis la pasintjarajn celojn, starigis novajn kaj proponis buĝeton de UEA-rimedoj por iliaj realigo. La rezolucio, kies teksto vi trovos sur la sekva paĝo, estis unuanime akceptita de la komitato.

Niaj eroj: lUKte, ne tro sUKcese

La eduka komponento de la kongreso suferis multajn perturbojn, kiun eĉ persona vizito de ILEI-gvidanto al la Centra Oficejo unu semajnon antaŭ la UK sukcesis nur mildigi kaj ne solvi. Resumo de tiuj malfacilaĵoj aperis laŭ nia teksto en la kongres-raporta numero de *Esperanto* kaj en memorando al UEA, sekve de protesta interveno en la Komitato.

Kvankam komisiono de la UEA-komitato ne plu ekzistas, ekde la momento, kiam ILEI transprenis tiun laboron, kunsido de tiu neekzistanta komisiono estis anoncita lund-matene, en eklipsaj rilatoj kun la publika kunveno de ILEI. Tio kondamnis ambaŭ al malsukceso, ĉar evidente la samaj personoj kaj gvidos ambaŭ kaj volos ĉeesti ambaŭ. Plie ili okazis en ejoj pli ol mejlon disaj unu de la alia, tiel ambaŭ devis esti mallongigitaj, ne povis fintrakti siajn tagordojn, dum kunvenemuloj karavankuris tra la stratoj serĉantaj la ankoraŭ ne ŝilde indikitan salonon.

ILEI refoje rekomendas la kombinon de tiuj du kunsidoj kaj ĝian lokadon en la ĉefa kongresejo. Ĉi-jare dum ILEI ekziliĝis al la provincoj, du fakaj asocioj eĉ neniel ligitaj al UEA ricevis kongresejajn salonojn.

La Tago de la Lernejo estis anoncita en la Kongresa Libro por mardo, kun gvidanto, kiu ankoraŭ ne akceptis tiun taskon, sed tute mankis en la laŭhora skemo la serĉenda salono kaj horo. Tial la publiko kompreneble forlogiĝis al la abundo de konataj kaj konkuraj aranĝoj (i.a. la ĉefa kongrestema debato inter Wells kaj Honey kaj teatra prezentaĵo). La prezidanto de ILEI mem estis tute malhelpita eĉ unu minuton ĉeesti pro paralela kunsido. Enprogramigo de la UEA/ILEI ekzamenoj samtage, kvankam evidentis, ke la gvidantoj de ambaŭ estas la samaj, devigis mallongigon ĝis duon-post-tagmezo de la lernejo. Ĉio tio limigis nian publikon al ĉ. 60, la dekono de tiu en Varsovio antaŭ du jaroj, kaj tiun malmultecon emfazis la 5000-kapacita salonego asignita al ni.

Rezolucio pri edukado

akceptita unuanime de la Komitato de UEA en Brajtono

La Komitato

memorante, ke la pasintjara rezolucio prezentis tri specifajn projektojn, kune kun buĝeto

konstatas, ke ILEI plenumis siajn intencojn pri la instrurajtigaj kursoj kaj la internaciaj ekzamenoj sed prokrastis realigon de la 'Lerneja projekto'

atentigas, ke el la 2300 gld. disponigendaj, 600 respondas al neplenumita aŭ prokrastita laboro, sed

informiĝinte, ke la kostoj de la instrurajtiga kursmaterialo signife kreskis

rekomendas senprokrastan transpagon de 2000 gld. el la Propaganda Konto al ILEI por la eduka laboro en la pasinta jaro 1988-89 kaj

urĝas ILEI daŭrigi sian laboron, precipe sur la sekvaj kampoj:

- **Instrurajtigaj kursoj**: Okazigo de tria kurso simila al la du jam okazintaj; preparo de definitiva formo de la provizore eldonita kursmaterialo.
- **Internaciaj ekzamenoj UEA/ILEI**: Intensigo de la ofertado ekster la UK (ĝis nun en La Chaux-de-Fonds, San Francisko kaj la IJK); diskonigo de la regularo kaj postuloj de la ekzameno per ĵus pretigita informlibreto; kreo de testostokoj element- kaj mez-nivelaj; ellaboro de supera nivelo.
- **Internacia lernolibro**: Konstatinte la bezonon por tia lernolibro kun ligitaj instruhelpiloj (*Strategia plano, 44b*), ILEI entreprenas preparlaboron, kalkulante je la antaŭviditaj rimedoj (*Strategia plano, 7.3.2*)

La Komitato vokas al Landaj Asocioj de UEA:

- aktive kuraĝigi instruistojn en siaj landoj membriĝi en ILEI kaj tiel fortigi sin kaj ĝin;
- pli aktive helpi en la perado de la lernejana revuo *Juna amiko*, kiu aperas sub la aŭspiciado de ILEI;
- kunlabori kun ILEI kaj ĝiaj sekcioj ĉiuseptembre en la perenketila arigo de aktualaj informoj pri la instruado de Esperanto.

La Komitato elstrekas el la ekzamena regularo (artikolo 6) tri vortojn jene: "La skriba parto inkluzivas *diktaĵon, ekzercojn kaj* la taskon verki mallongan eseon."

La Komitato

informite, ke la maleblo de la estraro de ILEI kunveni dum la lasta jaro, ĉefe pro financaj kialoj, limigis la atingojn de la Ligo, kaj

referencante al la Strategia Plano (841 kaj 924)

aprobas ankaŭ la tiurilatan sumon en la sekva buĝeto por la laborjaro 1989/90:

Instrurajtiga kursmaterialo, kontribuo al la kostoj de 6000 gld.	600 gd.
Ekzamenoj: kreo de stokoj, supera nivelo	200 gd.
anoncoj en revuo 'Esperanto' pri la libreto	300 gd.
IPR: dissendado informcele al Landaj Asocioj de UEA	200 gd.
Internacia lernolibro: preparlaboroj	200 gd.
Fakkunsido de ILEI-estraro: kontribuo al vojaĝkostoj	800 gd.
SUMO	2300 gld.

La tago prenis la titolon 'Motivado en la instruado' kaj estis enkondukita per 20-minuta referaĵo de la vic-prezidanto de ILEI. Tion sekvis intervenoj de deko da petitoj kaj poste sinanoncintoj el la publiko. Nur kelkaj parolis pri la anoncita temo, intereson vekis raportoj pri la leĝaj situacioj por aŭ kontraŭ la instruado de Esperanto: en Britio reformo malhelpas, en Hungario helpas. La nova prezidanto de UEA, prof. John Wells, vizitis la kunvenon, veninte rekte de la debato pri la angla lingvo, por kritiki la ŝanĝojn de la brita lerneja studprogramo, kiu prioritatigas la instruadon de eŭropaj lingvoj (tiuj de EK) kaj lingvoj de komerca graveco (japana, araba, rusa). Ĉar Esperanto falas ekster tiujn kategoriojn, ĝi ekskludiĝas pli ol antaŭe, spite tion, ke ĝi estis lastatempe allasita al la reformita ekzamen-sistemo.

Merkrede estis la sola tute glata tago rilate al edukado – kaj ni bele ekskursis.

Ĵaŭdo portis denove problemojn. La antaŭ semajno interkonsentita ĉambro por la ekzamenoj de UEA/ILEI estis poste donita ankaŭ al alia kunsido, kiu insistis pri okupo. Nia alternativa ĉambro pruviĝis netaŭga, tria alternativo signifis redirekti la homamason, kiu serĉis la kunsidon pri kongresoj, kaj por kiu la asignita kaj de ni transprenita ĉambro estintus multe tro malgranda. Sed tio havis la sekvon, ke la ekzamenantoj, anstataŭ orde kaj kviete pretigi la testojn, devis ĝis la lasta momento serĉi tablojn kaj seĝojn kaj redirekti fluegon da kongresanoj (des pli, ke tiu kunsido translokis sin jam duan fojon al loko nekonata ankaŭ al ni, sekve ni devis eĉ dufoje fordirekti kongres-diskutemulojn). Spite tiujn malfacilaĵojn, naŭ kandidatoj sukcesis diversgrade en la antaŭtesta, skriba kaj parola partoj de la novaj ekzamenoj por porti la jaran nombron de sukcesintoj al 33. Sep sukcesintoj ricevis siajn diplomojn de la prezidanto de ILEI kaj mag. Irena Szanser, la prezidanto de la surloka komisiono, en neformala kunveneto. Unu estis transdonita simbole dum la Solena Fermo de la UK al juna brazilano, Cicero Soares, kaj alia same simbole, fine de la ILEI-konferenco.

Estas evidente granda interesiĝo pri la ekzamenoj kaj normoj; nia ĵus antaŭ la UK aperinta *Gvidilo al la elementa kaj meza ekzamenoj de UEA/ILEI* furoris. Ene de tri tagoj ĉiuj el la cent portitaj ekzempleroj elĉerpiĝis; ni estus povintaj vendi 200. Rezervaj stokoj atingis nian konferencon en Carleon, sed ne la UK. Intertempe ILEI tute ne plu havas stokojn, kaj ni pretigas represon.

Aliaj signifaj edukaj eroj de la UK estas la Cseh-kursoj kaj la konversaciaj rondoj. Tiuj lastaj kiel en multaj antaŭaj jaroj estis tre popularaj, kaj tute ne adekvate preparitaj, sen sufiĉe da gvidantoj kaj sen sufiĉe da ĉambroj. Pro program-kolizioj la nekonsultita, sed nomita respondeculo devis retiriĝi, varbinte tri vervulojn lastmomente. Ili kaj iliaj disĉiploj nomadis (t.n.e. nomis daŭre) ĉirkaŭ la kongresejoj serĉantaj liberajn ĉambrojn kaj unu la alian. Tiuj,

kiuj trovis sin reciproke bone amuziĝis kaj sendube lertiĝis en la parola uzo de la lingvo. Dankojn al Dario Besseghini (I), Liljana Prančič (YU) kaj Sylvain Auclair (CDN).

Laste, la kolizio inter la komenco de la ILEI-konferenco kaj la komitatkunsidoj de UEA perdigis al tiulasta almenaŭ tri komitatanojn, ĝuste kiam prezentiĝis la eduka rezolucio kaj kiam venis al diskuto la Strategia Plano.

Ne havas sencon pri misoj nur plendi; nia memorando al UEA (vidu la keston) celas eviti similajn problemojn estonte. ILEI jam fiksis temon, skemon kaj respondeculon por la Tago de la Lernejo en Havano kaj liveris al UEA detalan liston de bezonoj kaj deziroj por ĉiu eduka ero. Tion nia estraro fajnigos kaj rekontrolos dum sia februara kunsido. Surbaze de tio, ni atendu kaj esperu je pli fruktodona kunlaboro estonte.

smg

Memorando pri edukaj programoj en la UK de Brajtono

1. Kolizio inter la kunsido de ILEI kaj de la komitata/publika kunsido pri edukado, kiun klare gvidas la samaj homoj, en ĉambroj disaj je 2 km unu de la alia. Tio, plus la eksterordinara komitatkunsido, donis 45 minutojn anstataŭ 90 por la komitata kunsido, kaj 60 anstataŭ 120 por tiu de ILEI. Nek unu nek la alia sukcesis fintrakti sian tagordon; al la ILEI kunsido duono de la gvidantoj devis alveni malfrue, preskaŭ ĉiuj devis foriri meze de diskutoj.
2. Tago de la Lernejo sen anoncita salono kaj horo en KL certigis minimuman ĉeeston (ĉ. 60 homoj, kp. 600 en Varsovio). Ke mankis detala program-priskribo kulpis ILEI, sed ĉar la programo staris en KL, ĝi devis figuri en la program-skemo.
3. Trihora skriba ekzameno asignita al duhora tempodaŭro en salono sen tabloj. Kolizio kun alia kunsido devigis ekzamenantojn redirekti kongresanojn kaj serĉi tablojn ĝis lasta sekundo anstataŭ orde prepariĝi por ekzamenado.
4. Konversaciaj rondoj anoncitaj je du niveloj sed disponigo de nur unu ĉambro. Praktiko montras, ke almenaŭ 4 ĉambroj kaj gvidantoj necesas, kaj ke horoj estu antaŭfiksitaj. En Brajtono la lastmomente varbitaj gvidantoj devis ĉiutage elbatali salonojn tiel ke konversaciemuloj vagis senespere de ĉambro al ĉambro, alvenantaj unu post unu malfrue al la grupoj.

ILEI, kiel la sola faka asocio, plenumanta rekte tutan labor-terenon por UEA, tamen havu sian fakan kunsidon en la ĉefa kongresejo kaj siajn elpaŝojn en taŭgaj salonoj, anoncitaj kaj sen kolizioj.



EL LA VIVO DE NIAJ SEKCIOJ

ESTONIO: PROGRESIGA EO-SEMINARIO EN SOLECA MARBORDA LOKO

Kiel jam sciate, la Eo-Asocio de Estonio restariĝis en marto 1989 post 49-jara stagnado post ĝia fermo en 1940 far la Stalina diktaturo. Ni tuj ekagadis aktive, des pli, ke laŭ la decido de Estona Klerig-Komitato Eo estos ekde la nova lernojaro en estonaj lernejoj *elektebla* fremdlingvo, komence de kvinaj klasoj, kun konsento de la lerneja estraro. Pro tio ni komencis jam nun prepari novajn Eo-instruistojn. Ni jam aranĝis du (...) seminariojn por la dezirantoj, kiujn ni trovis ĉ. 30. (...) Nun ni decidis aranĝi intensan praktikadon por la novaj instruontoj ĉefe en parolo kaj metodoj.

Por tio ni uzis nian memriparitan domon apud marbordo en la regiono de Pärnu(...). Ni nomis tiun domon fiere "Esperejo".(...) Alvenis 15 pedagogoj, el kiuj nur du havis ioman instru-praktikon. (...)La rezultoj de la seminario estas videblaj. Homoj, kiuj komence balbutis, en la fino parolis libere kaj kuraĝe. Elstaris la "juna generacio": plej bone progresis Riina Valdmets el Pöltsamaa, Reet Treial el Rakvere, Sirje Maasikamäe el Tallinn kaj Vaike Birk el Pärnu.(...)

En septembro komenciĝos la nova lernojaro. Kiom da lernantoj estos dezirantaj eklerni la internacian lingvon, kiom da instruistoj ni bezonos – tion ni ekscios post la komenco de la lerneja laboro. Dume ni devos por la lingvo propagandi kuraĝe, ĉar dum la stagno-jaroj tion ni ne povis aktive kaj publike fari.

Johannes Palu, Tallinn, Estonio

BELGIO

De la 10a ĝis la 14a de julio okazis staĝo de Eo en la kulturdomo en Welkenraedt. Ĝin partoprenis 5 infanoj 12 ĝis 15 jaraj kaj 1 plenkreskulino. Instruis kvar personoj: Benŭa, 17jara Welkenraedt-ano; Marie, sekretariino de la klubo; Nora, 15jara hungarino, denaske E-lingvano; Steffen, 22jara germano, studento en la urbo Aachen.

Horaro: de la 9a ĝis la 12a30: instruado de Eo; de la 13a30 ĝis la 15a: vizitado de loka entrepreno, klarigo en Eo; de la 15a ĝis la 16a: sportado.

La matenaj kursoj baziĝis sur la tekstoj de la posttagmezaj vizitoj: lunde en magazeno *Oxfam*, helpado al la tria mondo (vestaĵoj, koloroj, manĝaĵoj); mardon en loka presejo (presliteroj el kupro, zinko, plumbo, nilono); merkredon okazis diskutrondo pri hipnoto kun Jacques Farjon kaj japano; ĵaŭdon en la stacidomo de Welkenraedt (lokomotivo, bremso, horloĝo); vendredon ĉe la Ruĝa Kruco (donado de plasmo kaj detala vizitado de ambulanco). Mardon 18an, okazis tuttaga vizito al IJK en Kerkrade (NL), kie ĉiu lernanto estis

akceptita kaj akompanita de instruema e-isto. Dankon al ili.

POR LA VENONTA JARO, ĉar kvin partoprenintoj venis de malproksima distanco, ni planas la staĝon en internulejo de la franca komunumo en Verviers. Informojn donos la raportinto:

Marie GRELA, rue de la Colline 16. B-4840 Welkenraedt. tel. 32/(0)87/88 08 32.

ĈINIO

Inter la 6a kaj 11a de novembro 1989, nia ĉina sekcio elpaŝos kunlabore kun la universitato de Guangxi en la organizado de Azia Konferenco de Esperanto-Instruado, kiu okazos en la sud-ĉina urbo Nanning.

Kadre de la aranĝo okazos prelegoj, demonstro-lecionoj, Cseh-kurso, seminario por instruistoj, diskuto pri la stato de instruado de Esperanto en Azio kaj ekskursoj (interalie al la mondfama river-monta pejzaĝo de Guilin).

Nia ILEI-prezidanto, konscia pri la graveco sekvi kaj apogi progreson en Azio, akceptis inviton partopreni la aranĝon kaj kunportos instruhelpilojn el aliaj ILEI-sekcioj. S-ro Symoens planas ankaŭ starigi ekzamenan sesion de niaj internaciaj UEA-ILEI ekzamenoj, kunlabore kun nia estrarano, s-ro Zhang Danchen . Se tio sukcesos, ni estos portintaj niajn ekzamenojn ene de la unua jaro de la relanĉo en Amerikon kaj Azion. Ni esperas raporti detale pri tiu konferenco en nia venonta aŭ postvenonta numero de IPR.

Esperanto por ni

Jen finfine sistema lernilo por junuloj inter la aĝoj de 8 kaj 12. Per abundaj bildoj serio de kvar libroj prezentas la bazon de Esperanto per nur Esperanto kaj prezentas multajn aktivigajn ekzercojn. Verkis Jozefo kaj Helena Mikulás.

Ne tiom por memlernantoj, sed tre utila materialo en la manoj de sperta instruisto. 4 volumoj kun entute 264 paĝoj. Koloraj allogaj kovriloj. Ĉiu volumo kostas 45 forintojn de Hungara Esperanto-Asocio aŭ 9,90 gld. de UEA.

Ĝis 15 kaj poste

Nova serio de lingvaj lerniloj estas lanĉita de ĵus fondita memstara entrepreno en Hungario, per la apero de "Do l5 i posle", 45-paĝa legolibro de la rusa, kun variaj legaĵoj, ekzercoj kaj enigmoj, ĉefe por junaj lernantoj.

Sekvos ĝin libretoj en la franca, angla kaj Esperanto. La nuna libreto estas nur ruslingva, sed fine de ĝi aperas du specimenaj paĝoj el la planata Esperanta eldono, kune kun hungarlingva alvoko por la enlanda koresponda kurso de Esperanto. La libreto havas plenkoloran kovrilon, kaj 8 plenkolorajn bildpaĝojn interne, kun aldone A3-formata kolorafiŝo. La prezo en Hungario estas 55 forintoj. Kiu eksterlande instruas la rusan petu specimenon kaj konstatu, ĉu ĝi taŭgas por viaj bezonoj. Ju pli rapide disvendiĝos la alilingvaj libroj, des pli frue povos aperi la unua Esperanta kajero. Eksterlandaj revendistoj bonvenaj. Informpetojn direktu al: Tramontana, Júlia u 2a, fszt. 1, H-1026 Budapest, Hungario.

INFORMOJ

TERMINOLOGIA ALVOKO

Malgraŭ diversaj obstakloj kaj problemoj, manko de homfortoj kaj materiaj rimedoj, la Termiologia Esperanto-Centro paŝon post paŝo elformiĝas. Aktuale ĝi pretigas sin por fariĝi aktiva membro en *TermNet* kaj tiel envicigi E-on inter la terminologie konsiderindajn lingvojn. Tio jam ne nur estas afero de TEC, sed de la tuta Eo-movado. Ĉu la TermNet-membreco restos formala (kaj do la sufiĉe alta kotizo estos perdita), ĉu ni sukcesos plene profiti el la internacia kunlaboro por altnivele evoluigi nian fakan lingvon kaj eble eĉ pruvi, ke Eo pro sia planiteco estas precipe taŭga terminologio-lingvo – tio dependos i. a. de la kompreno kaj helpo de la tuta E-a komunumo. Do, ankaŭ de vi!

Se vi volas subteni la agadon de TEC kaj interesigi konatulojn – jen kelkaj ebloj:

1. Se vi interesiĝas pri kunlaboro en Terminografia Komisiono (TK) por ellabori terminaron de via propra (scienca) fako, petu registrigon kiel "*Fakulo*".

2. Se vi deziras gvidi tian TK, reprezenti TEC-on en via faka aŭ landa Eo-Asocio aŭ en ekstermovada organizo, aŭ alimaniere partopreni en la organizado-gvidado de nia institucio kaj pretas investi tempon, forton kaj eble eĉ monon por instruiĝi pri diversaj aspektoj de terminologio, aniĝu al TEC kiel "*organizanto*".

3. Se vi (nur) volas regule ricevi informojn pri TEC, anoncu tion kaj vi estos registrita kiel "*Interesito*".

Kontaktadreso por 1-3. estas:
TEC-Sekcio de Reprezentanto
W. Blanke, O.-Nagel-Str. 110,
Pf. 113-05, DDR-1141 BERLIN

4. Se vi volas (kaj povas) finance subteni la agadon de TEC, bv. transpagi vian donacon al UEA en Roterdamo, al la *konto wüster*. Eĉ malgrandaj donacoj bonvenos – ili validos kiel morala subteno!

W. Blanke

LITERATURA FOIRO 20-JARA

La kultura revuo fondita de la literatura rondo "La Patrolo" inaŭguris per la nro 117 (februaro 1989) sian dudekan jarkolekton.

LF, kies unuopaj numeroj amplekasis nur 16 paĝojn, atingis ĉi-jare 56, konservante la dumonatan aperoftecon, laŭ konstanta kresko tra la jardekoj. Ĝia enhavo, ĉefe beletra, dediĉas grandan atenton al ĉiuj facetoj de la Eo-kulturo: teatro, muziko, pedagogio, planlingvistiko, kulturpolitiko, movadologio.

La ĉefredaktoro de LF estis Giorgio Silfer, ĝis la nro 60 (aprilo 1980): de post tiam gvidas la redaktan stabon s-ino Perla Ari Martinelli, kiu per sia talento de arta direktoro firmigis la grafikan nivelon de la revuo, sendube unu el la plej belaspektaj en nia gazetaro.

LF naskiĝis kiel periodaĵo en Eo, ne kiel e-ista organo: al tiu ĉi devizo ĝi estis ĉiam fidela, starigante kun sukceso ponton inter la mikrosocia E-kulturo kaj la makrosocio. LF rolis

ĉiam sendepende kaj aŭtonome, stimulante la evoluon de la kolektiva konscio en Esperantio, kaj la kvalitan kreskon de nia parolkomunumo.

LF estas eldonata de la kooperativo de Literatura Foiro (Svislando); ĝiaj redaktantoj kaj kunlaborantoj laboras senpage. La adreso de la redakcio estas en Italio: via Pantano 17, I-20122 Milano. Gratulojn al Literatura Foiro!

BAZA LEGOLISTO DE LA ORIGINALA ESPERANTO-LITERATURO

En la libro de William Auld "La fenomeno Esperanto" aperis listo de E-e originale verkitaj libroj. La listo estis represita en Hungara Vivo 1988/3 kun komento de Vilmos Benczik:

Baza legolisto de la originala E-literaturo

Poezio

Auld, William (red.): Esperanta antologio. Dua eldono, reviziita kaj kompletigita. UEA, Rotterdam, 1984. 887 p.

Auld, W.; Dinwoodie, J. S.; Francis, J.I.; Rossetti, R.: Kvaropo. J. Régulo, La Laguna, 1952, 267 p. (2a eld.: HEA, Budapest, 1977)

Auld, William: La infana raso. J. Régulo, La Laguna, 1956, 104 p. (4 eldonoj, laste represita en 'En barko senpilota', Edistudio, Pisa, 1987.)

Baghy, Julio: Pilgrimo. Budapest, 1926. 124 p.

Baghy, Julio: Preter la vivo. Literatura Mondo, Budapest, 1923. 124 p.

Boulton, Marjorie: Eroj. J. Régulo, La Laguna, 1955. 286 p.

Hohlov, N.: La tajdo. Heroldo de Esperanto, 1928. 61 p.

Kalocsay, Kálmán: Streĉita kordo. Literatura Mondo, Budapest, 1931. 189 p. (2a eldono ĉe Iltis, Saarbrücken)

Kock, Edwin de: Fajro sur mia lango. J. Régulo, La Laguna, 1967. 119 p.

Kurzens, Nikolai: Mia spektro. Literatura Mondo, Budapest, 1938. 64 p. (Reeldono en Kanado)

Maŭra, G. E.: Duonvoĉe. J. Régulo, La Laguna, 2a eld., 1963. 179 p.

Miĥalski, Eŭgeno: Prologo. SAT, Leipzig, 1929. 62 p.

Miyamoto Masao: Invit' al japanesko. J. Régulo, La Laguna, 1971. 110 p.

Peneter, Peter: Sekretaj sonetoj. Konfidencie (Budapeŝt? 1931?) 95 p. (Reeldonata ĉe HEA)

Privat, Edmond: Tra l'silento. Ĝenevo, 1912, 29 p. (Reeldonita ĉe HEA kaj 'Pro Esperanto', Vieno, 1989)

Ragnarsson, Baldur: Ŝtupoj sen nomo. J. Régulo, La Laguna, 1959. 127 p.

Rossetti, Reto: Pinta krajono. J. Régulo, La Laguna, 1959. 128 p.

Sadler, Victor: Memkritiko. Eldonejo Koko, Kopenhago, 1967. 60 p.

Schwartz, Raymond: La stranga butiko. Esperantista Centra Librejo, Parizo, 1931. 127 p. (Dua eldono Dansk E-Forlag, Kopenhago, 1974)

Schwartz, Raymond: Verdkata testamento. Centra Librejo Esperanta, Parizo, 1926. 123 p. (Represo de la dua eldono, DEF, Kopenhago, 1974)

Tárkony, Lajos: Soifo. J. Régulo, La Laguna, 1964. 231 p.

Ueyama Masao: Por forviŝi la memoron pri ŝi. L"Omnibuso, Kioto, 1974, 95 p.

Proza fikcio

Baghy, Julio: Sur sanga tero. 2a eld. Szalay, Budapest, 1933. 254 p.

Baghy, Julio: Viktimoj. Hungara Esperanto-Instituto, Budapest, 1925. 162 p. (Ambaŭ represotaj ĉe HEA).

Boulton, Marjorie: Okuloj. J. Régulo, La Laguna, 1967. 177 p.

Bulthuis, H. J.: Idoj de Orfeo. Den Haag, 1923. 542 p.

Engholm, Stellan: Homoj sur la tero. Literatura Mondo, Budapest, 1932. 201 p.

Forge, Jean: Mr. Tot aĉetas mil okulojn. Literatura Mondo, Budapest, 1934. 243 p. (Reeldono Fondumo Esperanto, Helsinki, 1973.)

Francis, John: La granda kaldrono. TK/Stafeto, Antverpeno, 1978. 592 p.

Francis, John: Vitralo. J. Régulo, La Laguna, 1960. 135 p.

Konisi Gaku: Vage tra la dimensioj, Japana Esperanto-Ligo, 1976. 77 p.

Lorjak: Regulus. Eldono Gabrielli, Ascoli Piceno, 1981. 340 p.

Luyken, H. A.: Pro Iŝtar. Hirt & Sohn, Leipzig, 1924. 304 p.

Miyamoto Masao: Naskitaj sur la ruino – Okinava. Librejo Pirato, 1976. 146 p.

Nemere, István: Sur kampo granita. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983. 125 p.

Newell, L. N.: Bakŝiŝ. Literatura Mondo, Budapest, 1938. 149 p. (Reeldono Iltis, 1983)

Piĉ, Karolo: La litomiŝla tombejo. Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1981. 276 p.

Ribillard, Jean: Vivo kaj opinioj de majstro M'Saud. J. Régulo, La Laguna, 1963. 143 p.

Robinson, Kenelm: Se grenereto...Londono, 1930. 158 p.

Rosbach, Johan Hammond: Fianĉo de l'sorto. Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 192 p.

Rossetti, Cezaro: Kredu min, sinjorino! Heroldo de Esperanto, Scheveningen, 1950. 259 p. (Reeldono SATEB, Londono, 1974)

Rossetti, Reto: El la maniko. J. Régulo, La Laguna, 1955. 221 p. (Reeldono ĉe Iltis, 1984)

Rossetti, R.; Szilágyi, F. 33 rakontoj: La Esperanta novelarto. J. Régulo, La Laguna, 1964. 328 p.

Schwartz, Raymond: Kiel akvo de l'rivero. J. Régulo, La Laguna, 1963. 487 p. (reeldonita Iltis, 1987)

Schwartz, Raymond: Vole...novele. TK, Kopenhago, 1971. 192 p. (Reeldono Iltis, 1981)
Sturmer, K. R. C.: Por recenzo! The Esperanto Publishing Co., Londono, 1930. 61 p.
Szathmári, Sándor: Vojaĝo al Kazohinio. SAT, Parizo, 1958. 315 p.
Szilágyi, Ferenc: La granda aventuro. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1945. 143 p. (Reeldono ĉe HEA, 1988.)
Tóth, Endre: Lappar, la Antikristo. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982. 137 p.
Varankin, Vladimir: Metropoliteno. Ekrelo, Amsterdam, 1933. 200 p. (Reeldono TK, Kopenhago, 1977.)
La informoj pri reeldonoj estas laŭ niaj propraj scioj kaj tial ne kompletaj.

"(...)Oni ofte konstatis, ke en la disvastigado de la E-a kulturo la ĉefa malhelpo estas tio, ke E-ujo ne havas kulturan substrukturon, t. e. lernejan reton, kiel la naciaj kulturoj. Pro tio la kulturaj-literaturaj konoj de la e-istoj estas tre hazardaj, mankas al ili komuna bazo. Nun ni havas la bazon, produkton de la ĉefa korifeo de nia literaturo. Ni uzu ĝin. Kiel? Unue, tiu ĉi listo devas esti diskonigita ĉie. Ĝi atingu senescepte ĉiun e-iston, kiu scias legi. Se plurfoje, do tiom pli bone. Due, iamaniere ĝi eniru niajn ekzamenajn postulojn. Komprenebleoni ne devas preskribi por la ekzameniĝantoj en mezgrada ekzameno legi ĉiujn 51 librojn. Sed jes oni povas devigi ilin elekti la kutime legendajn tri, kvin aŭ ses librojn ĝuste el tiu ĉi listo!"

Estas do evidenta la pedagogia intereso de la listo, kiun ni ĉi-supre represas kun pardonpeto al tiuj, kiuj ĝin de aliloke posedas.

EDISTUDIO... la arto eldoni

"Daŭra mendo" de Edistudio estas servo, ĝis nun rezervita al libroservoj kaj revendistoj, kiun nun Edistudio proponas al ĉiuj siaj klientoj: per simpla poŝtkarto al

Edistudio, cp 213, I-56100 Pisa, Italujo

vi ricevos tuj post ilia apero ĉiujn librojn, kiujn Edistudio eldonos (kaj per alia poŝtkarto vi kiam ajn povos nuligi la servon).

Vi ricevos la librojn post ilia eldonado, sen aldono de sendokostoj. Se via mendo estas por pluraj ekzempleroj, vi ankaŭ rajtos al aparta rabato. Vi pagos post la ricevo de la libroj, per la poŝtĉekkonto de Edistudio aŭ per via konto ĉe UEA (aŭ per banko, sed tiam aldoniĝos la bankkostoj, kiuj en Italujo estas sufiĉe altaj).

Cetere, pri la kvalito de la ricevotaj libroj ne estas duboj: rigardu ekzemple la lastajn proponojn: *Itala Antologio*, la plena poemaro de William Auld *En barko senpilota*, *Aŭstralia Antologio*. La venontaj proponoj estos

je la sama nivelo. En preparo ĉe Edistudio:

Julius Balbin: IMPERIOJ DE L'KORO. du poemaroj, ĉ 240 p., 21 cm, kartone (rigide) bindita, ĉ. 30 nl. gld.

Manjo Austin: INSULO DE REVOJ, novelo – premio de EVA 1989, ĉ. 160 p., 21 cm, broŝurita, ĉ. 27 nl. gld.

Georgo Handzlik: VIVU ESPERANTUJO, sonkasedo kun tekstokajero, ĉ. 45 minutoj da muziko, ĉ. 16 p. teksto-kajero, 21 nl. gld.

Tibor Sekelj: ĜAMBO RAFIKI, la lasta neeldonita verko de la fama e-isto-esploristo, ĉ. 240 p., 21 cm., broŝurita, ĉ. 30 nl. gld.

Ivo Andriĉ (Nobel-premio): PONTO SUPER DRINO, trad. Antonije Sekelj, romano, ĉ. 300 p., 21 cm, proponita por la serio Oriento-Okcidento, ĉ. 36 nl. gld.

El la programo de Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds, Svislando) por 1990

Eo-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj: en kiu ajn semajno de la jaro, se estas almenaŭ 5 interesatoj. Okazigo de la ceteraj kursoj simile havas kondiĉon de minimume 5 aliĝintoj.

3 - 4 jan. kaj 19 - 20 apr.: *Eo-ekzamenoj laŭ la internaciaj normoj de UEA-ILEI*, ĉefekzamenanto Stefan MACGILL. Antaŭe, 26 dec - 3 jan. ne-intensiva prepara kurso kadre de la vintra ski-ferio kaj 16-21 apr. (intensiva pretiĝo al la ekzameno).

18 - 21 jan.: *Kurso pri faka tradukado organizita de d-ro Klaus Schubert el BSO/Research en Utrecht*, gvidata de Claude PIRON kaj Brian MOON.

22 - 27 jan.: *Ĉapitroj el la E-a lingvistiko*, Ilona KOUTNY.

29 jan. - 3 feb.: *Aplikata lingvistiko kaj Eo*, Ilona KOUTNY.

25 - 30 jun.: *"La infana raso" de William Auld*, István ERTL.

2 - 7 jul.: *Lajos Tárkony kaj la Budapeŝta skolo*, István ERTL.

30 jul. - 4 aŭg.:*Intensiva pedagogia-metodika kurso pri la Eo-instruado perbilda*, Claude GACOND. Intimiĝo kun la diversaj artoj uzi bildojn por paroligi Eo-lernantojn: flanelbildojn, afiŝelementojn, ludkartojn, lumbildojn, filmojn eĉ ktp.

6 - 18 aŭg.: *Tria intensiva pedagogia-metodika kurso organizita de UEA-ILEI kun KCE.* **Celo**: Rajtigo al Eo-kursgvidado laŭ la internacia unuigita programo de UEA-ILEI. La kurso okazos laŭ la instruprogramo de UEA-ILEI. La studado intensiva finiĝos la unuan semajnon per skriba ekzameno kaj la duan semajnon per praktikaj kaj teoriaj ekzamenoj kaj per ricevo de atestilo de UEA-ILEI rajtiganta gvidi internaciajn E-kursojn. La kurson rajtas partopreni personoj, kiuj bone konas E-on kaj posedas almenaŭ mezan klerecon. ILEI komisiis la didaktikan ĉefgvidadon de la kurso al magistrino **Irena SZANSER**, polino, metodologo pri fremdlingvo-instruado, kunlaboranto de la fremdlingva fako ĉe Varsovia Instituto por Klerigo de Instruistoj, aŭtoro de "Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Eo-instruado" kaj "Elektitaj problemoj de psikologio

por lingvo-instruisto", fundamentoj de la kurso aĉeteblaj ĉe KCE: SF 27.- aŭ perkoresponde. Petu la detalan informilon kun la horaro, prezoj kaj kun pliaj sciigoj. Detala temlisto de la kurso aperis en IPR 1988/4, p. 28-30.

20 - 25 aŭg.: *Redaktado de Eo-periodaĵoj*, Perla MARTINELLI.

20 - 25 aŭg.: *Sinjoro Tadeo, ĉefverko de la pola kaj de la Ea poezioj*, Giorgio SILFER.

Detalajn programojn petu ĉe KULTURA CENTRO ESPERANTISTA (KCE), Pf. 779, CH-2301, La Chaux-de-Fonds, Svislando.

STIPENDIO POR INFANOJ EN LA DEVIGA LERNEJO

Instruistoj-membroj de ILEI povas ricevi stipendiojn al infanoj en la deviga lernejo por partopreni en infankongreseto aŭ en simila aranĝo, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Eo amikiĝas.

Se Vi deziras stipendion, bonvolu peti la regulojn de Olle Olsson, Södra Esplanaden 23, S-223 52 Lund, Svedujo. Bonvolu aldoni respondkuponon!

Olle OLSSON

NOVA ESTRARO DE TEJO

En sia jarkunveno dum la Internacia Junulara Kongreso en Kerkrade, Nederlando, TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, elektis novan estraron kun dujara mandato. Simile kiel en UEA, signifaj ŝanĝoj okazis:

Prez: Jan Koszmaluk, Parizo (planado, eksteraj rilatoj, rilatoj kun UEA, scienca, studentara kaj faka agado).
Sekr.: Louise Frith, 17, ave. du Dr A. Netter, F-75012 Paris, Francio; tel. (+33-1) 43471836. Telekso: 649247. Telekopio: (+33-1) 42680229.
Vic-prez.: Yves Bellefeuille, Ottawa, Kanado. (kongresoj)
Kasisto: Hardo Bourguignon, Nieuwerkerk a/d Ijssel, Nederlando.
Estrarano: Torsten Bendias, Berlin, GDR (Aktivula trejnado)
Estrarano: Saskia Idzerda, Utrecht, Nederlando (Informado, kulturo)
Estrarano: Claude Rouget, Tromsø, Norvegio (Servoj, financo kaj administrado)

DEK DU SUKCESINTOJ

La sekvaj partoprenintoj de la Dua Pedagogia-Metodika Kurso de UEA-ILEI-KCE (10a – 22a de julio 1989) trapasis la kurson kaj ekzamenon sub la gvido de Mag. Irena Szanser en la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, Svislando: Petar Durdeviĉ (YU), Denis Flochon, Alex Clabaut, Jacqueline Poux, Catherine Roux, Alain Favre (F), Nicole Margot (CH), Bonnie Fonseca (US), Carla de Lorenzi (I), Slimane Targant (DZ), So Gilsu (KR), Smidéliusz Kálmánné (H). Pri la tria kurso kaj aliaj aranĝoj en KCE bonvolu legi supre. Gratulon al la sukcesintoj!

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino : Alfredo Juan Valle, Santa Fé 497, RA-1708 Morón (B.A.)
Aŭstrio : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilo : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉeĥio : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinio : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio : Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Finnlando : Mia Alikosti, Mustainvelj.kuja 3A1, SF-20700 Turku
Francio : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanio : Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-8900 Augsburg
Germana D.R. : Till-Dietrich Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel
Hispanio : Manuel López Hernández, Sol 75, E-41003 Sevilla
Hungario : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegio : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando : Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92 547 Lódź
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Rûzena Vojtechová, Bytovky blok "B", CS-05960 Tatavanská Lomnica
Sud-Afriko : Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : J.E. Bachrich, Apartado 3833, YV-1010 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000

Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui

Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago

Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran

Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel

Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende

Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
James Fairbank, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

tajpitaj kun duobla interspaco kaj marĝenoj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.